

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

“Esperanto Internacia”:
nova fondaĵo starigita

MSF: Esperanto estis
videbla en Dakaro

Éva Farkas-Tatár,
elstara Ĉe-instruistino

Wolfgang Kirschstein
pri la dekalogo de Jante

Originala novelo de
Edmund Grimley Evans

Aleksej Konstantinoviĉ
Tolstoj “Saĝo de l’ vivo”

Tradukoj – preskaŭ
triono de nia libraro

Esperanto-muziko
printempe kaj somere

“La Ondo” en 2010



2011

3

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №3 (197)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2011

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 550 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2011, №3 (197).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 февраля 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Tajponte ĉi tiun kolumnon, kies temo estas grava ŝanĝo en nia vivo, mi subite konstatis, ke ĉiuj lastaj jardeko-komencaj jaroj (1981, 1991, 2001 kaj 2011) estis gravaj turnopunktoj sur nia vivovojo.

En **1981** mi kaj Halina konatiĝis en la varmega Uzbekistano, kaj jam tiujare ni kune laboris en la legenda grupo LKS kaj en la Urala movado, kio baldaŭ rezultigis la kreon de la Urala Esperanto-Komitato, Kolektiva Esperanta Biblioteko, bulteno *Ekzakte*, sed, plej grave, ĉi tiu konatiĝo tute ŝanĝis niajn vivojn apartajn kaj kreis nian vivon komunan.

En **1991**, la plej lasta jaro de Sovetunio, ni entreprenis vojaĝon al Roterdamo kaj Antverpeno. Niaj konatiĝoj kun la agado (precipe, kun la redaktado kaj eldonado) de UEA kaj FEL, niaj interparoloj kun Simo Milojeviĉ, Osmo Buller, Mark Fettes, Paul Peeraerts kaj kun aliaj profesiuloj, decidigis nin en tiu jaro forlasi niajn sekurajn oficejojn, tute ŝanĝi nian vivon, kaj ĵeti nin en la maron de la profesia vivo esperantista.

En **2001**, la unua jaro de la nova jarmilo, venis plia grava ŝanĝo. Post multaj jaroj en Uralo, ni forlasis ĝin kaj migris al la plej okcidenta regiono de Ruslando. Nova urbo, novaj homoj, novaj ideoj, novaj elanoj, novaj vojaĝoj, nova kunlaboro kun amikoj-partneroj en Pollando, Litovio kaj Germanio. Ni estas tre kontentaj pri la dek jaroj en la hejmeca kaj mild-klimata prusa lando.

Sed komenciĝis nova jardeko, kaj en februaro **2011** ni havas plian ŝanĝon. Ni neniam publike skribis pri tio, sed ne plu eblas kaŝi, ke la sano de Halina, kiun unue ŝancelis la biologia katastrofo en Sverdlovsk (1979), tiel malprogresis, ke antaŭ kvar jaroj ŝiaj renoj ĉesis funkcii. Dum la lastaj kvar jaroj Halina subtenas la funkciadon de la organismo per ĉiutaga kvarfoja proceduro de peritonea dializado. Sed tio ne povas daŭri eterne. Necesas grefto de reno. Ĉar tiu operacio ne estas farebla en provinco, ni devis portempe forlasi Kaliningradon kaj ekloĝi en Moskvo atendante operacion.

Ĉi tiu urbo-ŝanĝo metas nin en komplikitajn cirkonstancojn.

Unue: pro la manko de la biblioteko, arkivo, aparataro k. s. preskaŭ ĉiuj niaj projektoj ekpaŭzas. Tio senteblas ankaŭ en *La Ondo*: ĉi-kajere mankas *Nia trezoro* kiun mi ne sukcesis verki sen niaj libroj. Ni petas vian komprenemon...

Due: la atendado de la operacio kutime daŭras unu-du jarojn, sed la ŝparaĵoj de nia tuta vivo apenaŭ sufiĉos por ses-sep monatoj da loĝado en tre modest-kondiĉa loĝejo, kiun ni luis rande de Moskvo. Sen aldonaj enspezoj somerofine ni devos kapitulaci... Se iuj el vi — kiuj dum jaroj legis niajn librojn kaj gazetojn, aŭskultis niajn podkastojn kaj prelegojn, partoprenis niajn renkontiĝojn, kursojn, konkursojn kaj ekskursojn, ĝuis koncertojn kaj ekspoziciojn kiujn ni organizis, uzis niajn bibliotekojn kaj arkivon — helpos transvivi la nunan malfacilan periodon, ni estos tre dankaj al vi. Ĉar temas pri tute nova informo, ne rapidu — pripensu dum unu monato, ĉu kaj kiel vi povos helpi, kaj en la venonta *Ondo* vi trovos pli da informoj pri la manieroj helpi.

Dankon pro via solidaremo!

Aleksander Korĵenkov

Sur la kovropaĝo estas Moskvo — nia provizora loĝurbo, kiu estas ankaŭ la plej granda urbo en Eŭropo.

Pli multe da homoj en la mondo lernu kaj uzu Esperanton

Je la Zamenhofa Tago, la 15an de decembro 2010, per subskribo de la fondodokumentoj en Esperanto-renkontiĝo en la meksika urbo Querétaro estis starigita la fondaĵo *Esperanto Internacia*. La ĉefiniciatoro de la nova fondaĵo, 48-jara diplomito en publika administrado, Martin Schäffer, aktivas por Esperanto ekde 1983 ĉefe sur la kampoj informado, gazetara laboro, financoj kaj administrado. Ekde 2006 li estas ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio kaj reprezentas la asocion en la komitato de UEA. Li membras en la estraro de la FAME-fondaĵo kaj estas prezidanto de la fondaĵo *Mondo*, kiun li mem fondis. Ekde 2006 li loĝas en Meksiko kaj laboras ankaŭ por la tiea movado kaj por la Latinamerika. Li afable konsentis respondi niajn demandojn.

Kiun celon havas *Esperanto Internacia*?

La ĉefaj celoj estas la informado pri Esperanto kaj ĝia instruado, por ke en la mondo estu pli da homoj, kiuj regas Esperanton kaj uzas ĝin. Estas multaj aliaj subceloj, kiuj helpu atingi la ĉefajn celojn, ekzemple, enkonduko de Esperanto kiel elekta studobjekto en lernejoj, universitatoj kaj ŝtatoj en la mondo.

Pluraj organizoj agas en tiuj direktoj, ekzemple, UEA kaj ties landaj asocioj, ankaŭ ILEI, ESF kaj aliaj. Kial ankoraŭ unu establo?

Estas pluraj organizaĵoj, kiuj agas flanke (eĉ tre flanke) sur la kampoj de informado kaj instruado (do la menciitaj celoj ne havas la prioritaton; ili okupas nur malgrandan parton de la financoj kaj aktivecoj de la koncernaj organizaĵoj). Aliaj nur agas en iu specifa regiono aŭ sur iu speciala kampo (ekzemple faka).

Esperanto Internacia kreiĝis, ĉar mankas internacia organizaĵo, kiu plene dediĉas sian laboron al la Esperanto-informado kaj al ĝia instruado investante grandan parton de la rimedoj (minimume 75% laŭ la statuto) al tiuj celoj. *Esperanto Internacia* estas miksaĵo inter tradicia fondaĵo kaj membro-organizo, ĉar ĉiu persono povas fariĝi amiko de la fondaĵo (tiel oni povas demokrata influo la politikon de la fondaĵo) aŭ esti simpatianto (eĉ senpage).

Kiel la fondaĵo planas realigi siajn celojn?

Jam ekzistas plano por plibonigi la Esperanto-agadon. El nia plano mi mencias nur kelkajn punktojn, ekzemple: klerigado de la Esperanto-aktivuloj (ĵurnalismo, surmerkato, psikologio de informado); sistema analizado de la nunaj mankoj kaj ilia forigo (en kiuj lingvoj kaj en kiuj landoj mankas taŭgaj informmaterialoj, kie tute ne estas retpaĝoj aŭ kie necesus modernigi ilin, kie mankas afiŝoj); uzado de modernaj metodoj de instigo (ekzemple, premioj por sukcesaj informaj aŭ ĵurnalismaj agadoj); informado pri Esperanto per

informstadoj ĉe lingvofoiroj, fakaj simpozioj pri lingvoj, junularaj renkontiĝoj aŭ similaj eventoj; okazigo aŭ partopreno en lingvofestivaloj; tradukado de gravaj retpaĝoj al Esperanto (por aperi pli ofte en la publiko); okazigo de informkaj instruvojaĝoj k. a.

Grandioza programo! Sed, precipe en la komenco, vi evidente elektos prioritatojn. Kiujn?

Jes, prioritato ni komence pritraktos la uzadon de modernaj metodoj de instigo al Esperanto-agado (Per malmulte da mono oni povas atingi multon.), la kreadon de informmaterialoj por diversaj lingvoj kaj landoj kaj la plibonigadon de retpaĝoj.

Por plenumi tiujn kaj pliajn taskojn estas bezonataj rimedoj. Kiel *Esperanto Internacia* planas kolekti ilin?

Homoj, kiuj volas finance subteni, povas fariĝi amikoj de la fondaĵo. Eta kontribuo farita de multaj homoj povas amasigi sufiĉe grandajn sumojn. Mi opinias, ke la nova fondaĵo estas la natura elekto de homoj, kiuj volas, ke pli multe da homoj en la mondo lernu kaj uzu Esperanton. Pro tio mi vidas sufiĉe vastajn eblojn kaj pensas, ke relative multaj homoj iĝos amikoj aŭ donacantoj. La Esperanto-parolantoj estas pli idealismaj ol multaj pensas. Oni ankaŭ povas fariĝi kunfondanto, pagante pli grandan sumon. Krome, ni kompreneble volas kolekti monon por specifaj projektoj kaj celoj. Tion la homoj speciale ŝatas, ĉar temas pri konkreta ago kaj ne pri anonima afero.

Kiel la kontribuantoj scios pri la utiligo de la donacitaj sumoj?

Malferma informado estas unu el la ĉefaj aferoj. Donacantoj ne nur povas difini celon de la donaco (se ili volas), sed la fondaĵo intencas raporti detale pri la uzado de la mono. Tiel oni vidos ekzakte, kiel la fondaĵo laboras kaj kion oni atingis per la rimedoj.

Krom la financaj rimedoj oni bezonas ankaŭ homfortojn.



Martin Schäffer ĉe televida intervjuo (*Canal 40*, Meksiko)

Jes, homfortoj kompreneble estas ege gravaj, sed mi ne vidas problemojn. Laŭ mi, ekzistas en la mondo amaso da homoj kiuj pretas labori por iu konkreta celo. Mankas kunordigado kaj mono por agado.

Kial en Meksiko?

Nu, simple ĉar ni devis elekti iun malvirtualan lokon por la fondaĵo. Ni elektis la urbon Querétaro, ĉar tie ekzistas juna kaj tre entuziasma Esperanto-grupo. La meksika movado estas ekzemplo, kiel sistema kaj celdirekta agado liveras sukcesojn. La movado en Meksiko en la lastaj jaroj forte kreskis kaj daŭre kreskas. Tion ni ankaŭ povas atingi sur internacia nivelo, investante pli da mono kaj laboro por konkretaj agadoj.

Ĉu vi planas kunlabori kun UEA kaj aliaj partneroj?

Jes, kompreneble! Kunlaboro estas nepre necesa por havi sukcesojn. Laŭ la fondintoj, ni devas labori kun aliaj por atingi niajn celojn.

Kiujn problemojn vi frontis post la fondaĵo?

Verdire, la problemoj ne estas multaj. La kreo de la strukturoj kaŭzis kaj daŭre kaŭzas relative multan laboron, sed plej grave estas, ke la homoj tre pozitive opinias pri la fondaĵo. Grandega plimulto de la homoj, kun kiuj mi kaj la aliaj fondintoj kaj amikoj parolis, opinias ke ekzistas granda neceso kaj potencialo por *Esperanto Internacia*. Mi do vidas tre pozitivan estontecon.

Kiel niaj legantoj povas ricevi pli da informoj pri la fondaĵo kaj kiel oni povas fariĝi “fondinto”, “amiko”, aŭ “simpatianto”?

Baldaŭ ni aperigos pliajn informojn en la reto. Intertempe oni povas skribi al EsperantoInternacia@gmail.com

Dankon pro la intervjuo, S-ro Schäffer, tre impresa projekto!



MSF: Esperanto ĉeestis en Dakaro

Mireille Grosjean estis oficiala reprezentanto de UEA en la Monda Socia Forumo, okazinta en Dakaro 6–11 feb 2011 kun ĉ. 75 mil partoprenantoj el pli ol 130 landoj. Ĝi estis la dek-unua Forumo, kiu ekde 2001 sub la slogano “Alia mondo eblas” kunigas alternativajn, kontraŭkapitalismajn, ekologiajn, virinajn, studentajn kaj aliajn movadojn kaj neregistarajn organizojn, opozicie al la Monda Ekonomia Forumo en Davoso.

Kun Grosjean ĉe la Esperanto-stando, lokita en la teritorio de la Dakara Universitato, deĵoris senegalaj esperantistoj Alphonse Diatta, Fidel Bassene, Assane Faye kaj Antoine Gommis, kiuj informis la vizitantojn kaj trafe analizis la situacion de Esperanto en Senegalio.

Abunda inform-materialo, disponigita de UEA, UFE, SAT-Amikaro kaj de pluraj esperantistoj, estis komplete disdonita al la forumanoj, precipe al senegalaj studentoj kaj gimnazianoj, kiuj montris grandan intereson pri Esperanto. Bedaŭrinde, pro ŝanĝo de la universitata rektoro, la planita studenta feriado dum la Forumo ne okazis; la studado daŭris, kaj la promesitaj salonoj ne estis disponigitaj, kaj la kunvenoj pasis en tendoj, en kiuj mankis elektro, mikrofonoj, laŭparoliloj — sekve multaj antaŭviditaj debatoj plurlingvaj estis nuligitaj.

La reprezentanto de UEA havis utilajn interparolojn kun politikistoj el Senegalio kaj kun aliaj gravaj forumanoj, interalie, kun Eva Joly, franca EU-parlamentano; ŝi estis ankaŭ plurfoje intervjuita por radio kaj televido.

Mireille Grosjean

Esperantisto: persono de la jaro

(*Eŭropa Bulteno*). La kroata urbeto Koprivnica ĉiujare elektas per reta voĉdonado la personon de la jaro.

Ankaŭ fine de 2010 estis dekkvino da kandidatoj, inter ili Kruno Puškar (vidu la suban foton), kiun oni kandidatisis pro lia aktiva engaĝiĝo pri Esperanto. Li gvidis tutjare en la urbeto kurson de Esperanto por trideko da koprivnicanoj, kiuj entuziasme lernis. Kaj li estis elektita per granda plimulto da voĉoj kiel la persono de la jaro 2010.

Kruno Puškar naskiĝis 31 mar 1986 en Koprivnica, finis bazan lernejon kaj gimnazion en Križevci, kaj studas en Filozofia fakultato en Zagrebo. Tie li preparas la diplomlaboraĵon pri la temo “Esperanto kiel Eŭropa Lingvofrankao”. Ekde 2009 li studas ankaŭ la ĉinan kaj ekde 2010 la japanan.

Esperanton la persono de la jaro lernis ĉe doktoro Velimir Piškorec en la Filozofia Fakultato de Zagrebo dum la studjaro 2008/2009 kaj poste fariĝis estrarano de la Kroatia Esperanto-Junulara Asocio.

Zlatko Tišljär



Eventoj

Varsovio eksilentis

La Esperanto-elsendoj de la Pola Radio komenciĝis en aprilo 1959, sojle de la 44a UK, kiu okazis en Varsovio je la jaro de la centjariĝo de Zamenhof.

Dum kelkaj jardekoj oni povis ĉiutage (dum longa periodo eĉ kelkfoje en la tago) aŭskulti la kurtondajn radio-programojn de la Esperanto-Redakcio ĉe la eksterlanda programo de la Pola Radio (Radio Polonia). Krom la propagandaj programoj pri sukcesoj de Pollando kaj politikaj komentarioj, neeviteblaj ĉe ŝtata radio, ofte sonis interesaj primovadaj kaj kulturaj programoj.

Fine de 2006 la Esperanto-redakcio ĉe la eksterlanda programo estis forigita, kaj la programoj en Esperanto daŭris kiel podkasto unu fojon ĉiutage en la Interreta Fako de la Pola Radio.

En 2009 antaŭ la 94a UK en Bjali-stoko la ĉiutaga aperritmo ĉesis, kaj la podkasto plu aperis nur kvin fojojn semajne, je la labortagoj.

En majo 2010 la ĉiulabortaga apero ĉesis, kaj, post eta paŭzo, la Esperanto-podkasto (ĉefe, ripetoj de malnovaj elsendoj) enretigis nur tri fojojn en la semajno: lunde, merkrede kaj vendrede.

Lunde, 31 jan 2011, en la reto aperis laŭvica podkasto, sed merkrede, 2 feb 2011, mankis nova programo. Tiutage en la Facebook-grupo de la amikoj de Pola Radio aperis anonco de la sola salajrata laboranto de la Esperanto-redakcio, Gabriela Kosiarska:

Karaj Geaŭskultantoj, Karaj Radio-amikoj, hodiaŭ ni havas por vi malĝojigan informon pri foresto de nia E-programo. Nome laŭ la decido de la Estraro de PR ekde hodiaŭ mi ne plu povas okupiĝi pri ili. Ni klopodos baldaŭ liveri al niaj aŭskultantoj kaj amikoj pliajn informojn.

Pliajn informojn ne sekvis, sed Andrzej Pettyn kaj Barbara Pietrzak, veteranoj de la Esperanto-redakcio, alvokis protestleteroj al la prezidanto de la Pola Radio, al la Pollandaj ambasadoj, kaj al la EU-deputito Małgorzata Handzlik.

Eble multaj sekvis la alvokon, sed ja ne ĉiuj. Ekzemple, HeKo, la retagentejo de la Esperanta Civito, jene reagis al la alvoko de Pettyn:

... en la XXI jarcento efikas tute aliaj protestaj rimedoj. Ekzemple, verŝi sur sin benzinon kaj fajrigi sin antaŭ la sidejo de Pola Radio, invitinte ĵurnalistojn kaj veniginte ambulancojn — la ŝancoj transvivi estas grandaj, tiuj refunkciigi la esperanto-elsendojn eĉ pli.

AIKo

TEJO kaj SEL seminarioj kune

Kadre de la kampanjo por reaktivigo de la Skolta Esperanto-Ligo (SEL), SEL kune kun TEJO organizas trejnseminaron por junaj aktivuloj kun la ĉefa temo: “Konstruante surbaze de diverseco — kiel ricevi la plej bonon el interorganiza junulara kunlaboro?”

La seminario okazos en Varsovio, Pollando, inter la 24a kaj 30a de majo 2011 (kun la 24a kaj la 30a kiel vojaĝtagoj). La programo enhavas interaktivajn laborsesiojn pri teknikoj kaj metodoj de moderna laboro de junaj asocioj, kaj pri efikaj manieroj organizi junularon uzante la temon de diverseco kaj egalrajteco en la internacia agado. Partoprenantoj lernos praktikajn metodojn de interkulturaj aktivecoj kaj la uzon de variaj iloj de la Konsilio de Eŭropo. Krome, oni plibonigos siajn gvidadajn lertojn. Ni ankaŭ vizitos la centran sidejon de ZHP (Pola Skolta Asocio) por diskuti ilian sperton en internacia kunlaboro kaj la potenciala uzado de la internacia lingvo. Krome ni vizitos la lokan grupon de esperantistoj.

Ni invitas junajn aktivulojn en la skolta movado kaj esperantistojn kiuj simpatias kun la skolta movado. La ĉefa kriterio estas klara intereso pri la temo de diverseco kaj egalrajteco en internacia kunlaboro kaj potenciala kontribuo al la programo.

Danke al la subvencio de la Eŭropa Junulara Fonduso ni povas inviti 30 partoprenantojn, pagante la restadkoston kaj kontribuante al la vojaĝkosto. La aliĝkoto estas 70 eŭroj (por eŭropanoj) aŭ 100 eŭroj (por neeŭropanoj) por la 5-taga programo. Pro la limigita nombro de lokoj ni devos selekti partoprenantojn uzante kriteriojn sur la aliĝilo, kiuj certigas la balancon de nacieco kaj sekso, kaj la potencialan kontribuon al la programo. La limdato por aliĝi estas la 15a de marto 2011.

Pliaj informoj inkluzive de la programo, la kriterioj kaj la aliĝilo haveblas ĉe: www.esperanto.org/skolta aŭ ĉe la Organiza Teamo: SEL.Reaktivigo@gmail.com.

Se Vi konas geskoltojn en Via loka urbo, tio estas granda oportuno por prezenti Esperanton kaj inviti lokajn geskoltojn por partopreni la trejnseminaron. Al tiuj, kiuj deziras partopreni, ni ofertas Esperanto-fulmkurson (retan/per Skajpo), por provizi ilin per la bazaj Esperanto-komprencapabloj kaj ebligi senperan komunikadon.

Łukasz Żebrowski



Plia sukcesa semajno en Poznano

La kuna okazigo de la unujara instruista trejnado de UAM kaj ILEI kunlaboro kun Edukado.net kaj de la tradiciaj interlingvistikaj sesioj en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), en Poznano (Pollando) pruvigas bona solvo.

La 11 personoj (po tri el Pollando kaj Hungario, du el Francio, po unu el Slovakio, Belgio kaj Germanio), kiuj komencis la trejnadon en septembro, ĉiuj renkontiĝis en februaro dum la dua sesio post diligenta semestra laboro hejme. Inter ili estas kvar stipendiatoj de ILEI-UEA kaj du polaj gejunuloj de PEA.

La metodikan programon gvidis Katalin Kováts, trejnante la kursanojn pri taktikoj de praktika instruado. La partoprenantoj jam hejme entuziasme pretiĝis al la konsultiĝo; kreis ekzercojn, horplanojn kaj recenzojn. Surloke ili spektis kaj analizis filmitajn lecionojn, trapasis ekzamenon, prezentis siajn “instruistajn kofrojn” kaj kvaronhoran provinstruadon, fine estis testataj pri instruado de tiklaj gramatikaĵoj. Zsófia Kóródy, ILEI-estrarano, enkondukis ilin al internaciaj kunlaborebloj en Eŭropo, Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, traktis la lernfaciligan rolon de Esperanto. Literaturan minikurson gvidis Tomasz Chmielik.

La aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj kompletigis la studprogramon: Ziko van Dijk prelegis pri nuntempaj problemoj de Esperanto-movado, ankaŭ pri la rolo de Zamenhof en la frua movado. La partoprenantoj de la universitata programo sekvis la okupojn de la traduka specialiĝo: teorion kaj praktikon de tradukado kaj interpretado kun Ilona Koutny; beletran tradukadon kun Tomasz Chmielik; tradukadon de novaĵoj kun Barbara Pietrzak.

Du partoprenantoj el la pasintjara grupo — Christophe Chazarein kaj Przemysław Wierzbowski — prezentis siajn finlaboraĵojn kaj sukcese plenumis la finan ekzamenon.

Poznano: Katalin Kováts kun la diplomo “La Esperantisto de la Jaro 2010”, ĵus emanigita al ŝi de Ilona Koutny, kiu mem estis la Esperantisto de la Jaro 2008. (Fotis *Margareta Symoens*)

La merkreda komuna vespero kunigis la partoprenantojn, instruistojn kaj lokajn esperantistojn en bona etoso. Ni kune festis la novdiplomitojn kaj Katalin, kiu merite iĝis Esperantisto de la Jaro 2010. Semajnfine la restintaj partoprenantoj vizitis la renesancan kastelon de Kórnik. Bedaŭrinde, la spertinterŝanĝojn kompletigis ankaŭ interŝanĝo de diversnaciaj grip-virusoj — kio en si mem unuigis la grupon kaj lasis en la membroj profundajn memorajojn.

Septembre sekvos la finekzamenoj por la instruista grupo kaj ankaŭ por la universitata grupo. Denove finiĝos 3-jara kursaro kun malmultaj persistuloj. ESF daŭre subtenas la studojn per stipendioj. Ĉu estos nova, dependas ankaŭ de vi! Pripensu la partoprenon en la nova universitata grupo ekde septembro!

Ilona Koutny

Pri Erasmo en la Malferma Tago

Ĉi-jare pasas 500 jaroj de post la apero de *Laŭdo de l' stulteco*, per kiu la granda pensulo Erasmo de Roterdamo (1466–1536) en satira formo atakis ĉiajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn. “Erasmo estas la plej granda filo de Roterdamo, sed antaŭ ĉio li estas la plej elstara figuro en la historio de humanismo kaj ĝuste tial ni esperantistoj devas lin koni”, — skribis la recenzanto de la Esperanta traduko de lia ĉefverko en la revuo *Esperanto*.

Sekve la 34a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA omaĝos la Erasmo-jubileon per du prelegoj. D-ino Věra Barandovská-Frank faros ĝeneralan enkondukon al la vivo kaj verkaro de Erasmo, kaj Gerrit Berveling prelegos pri *Laŭdo de l' stulteco*, kiun li esperantigis el la latina originalo. La traduko aperis en 1988 okaze de la 73a UK en Roterdamo.

La 34a Malferma Tago okazos sabaton, la 14an de majo. Krom la du prelegoj pri Erasmo kaj lia klasikaĵo, en la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentadoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10a ĝis la 17a horo.

GK UEA



En la Esperanto-urbo Herzberg oni povas nemultekoste kaj gaje ripozi en la samideana etoso.

Nature en naturo

La Esperanto-urbo Herzberg havis nekutiman kunvenon SANO 1 — “Nature en naturo”. Saneco kaj Alternativoj estis la esencoj por la Novjara Renkontiĝo, okazinta 28 dec 2010 — 2 jan 2011 en la bela turisma vilaĝo Sieber (urbo-parto de Herzberg), en la samnoma rivervalo en la nacia parko Harz.

Al la partoprenantoj ekplaĉis la simpla ideo, ke eblas organizi ne nur multekostajn kunvenojn, riĉajn bufedojn, elegantajn balojn, sed eblas bonfarti sen brilantaj ornamaĵoj kaj superflujaj elspezoj por nebezonataĵoj. La nekutiman kunfestadon ili decidis ripeti kaj ekde nun organizi regulajn jarfinajn-jarkomencajn seminariojn ĉi tie.

La programo, la prelegoj rilatis al naturo, natura vivmaniero. Christof Krick prelegis kaj projekciis fotojn pri la montgrimpadoj sur Mount Kenia kaj Kilimanĝaro. Kurt Fischer ellaboris duhoran altnivelan fakprelegon pri sana nutrado. Sekvis vigla diskutado. Vera Schlörke prelegis pri alternativa kuracado kaj homa energio, kaj praktike kuiris bongustaĵojn laŭ vegetara kaj vegana maniero.

Por la kulturaj programoj oni ne bezonis multon elspezi, la partoprenantoj mem kontribuis al la komuna bonetoso. Heike Schüssler ludis gitaron kaj brile kantis en Esperanto. La studento Lumo el Koreio rakontis pri sia lando kaj respondis al demandoj pri la aktuala politika situacio en la du koreaj landoj.

La prelegoj kaj diskutoj kun Alfred Schubert aparte plaĉis al la ĉeestantoj, ja estis traktitaj interesaj temoj pri diversaj alternativoj, ekzemple: nulenergia domo kaj ŝparema aŭto VW Lupo 3L.

Nome de la organizanta institucio Interkultura Centro Herzberg (ICH) Peter Zilvar raportis pri la konstantaj progresoj en Herzberg — la Esperanto-urbo, ekzemple, dum la vizito en la kastela muzeo en Herzberg.

Regis amikeca kaj bona etoso. Komune ni sukcesis krei ion novan, sen altaj kostoj; estis granda ĝojo kune prepari manĝaĵojn. Ni manĝis ne nur germanstilo, sed ankaŭ itale kaj ĉine, interparoladis pri sano, politiko, novaj vojoj por la Esperanto-movado. La komforta familia feriodomo en Sieber disponigis grandajn ĉambrojn, agrablajn apartamentojn.

La belega vintrovetero invitis al migradoj en la montaro, ekzemple, al la montara restoracio *Großer Knollen* (Granda Bulbo). Tie ili trovis bonkorajn gastigantojn kaj esperantlingvan manĝokarton.

La agrabla vetero allogis plurajn skiemulojn sub gvidado de Jürgen Tietz al la eksterordinara montarparadizo. La ekskursoj en la regiono tre plaĉis, ekzemple al la mezepoka urbo Duderstadt, al la monaĥejo Walkenried kun elstara muzeo pri la aktivecoj de la monaĥoj, al Sal-vala paradizo en Bad Sachsa, kie oni povis naĝi kaj saŭnumi. La nova viskifabrika en Zorge fakte aspektis kiel granda muzeo kun aromoj, elstaraj drinkaĵoj, produktado.

Por la venonta jarfina kunfestado oni rekomendas pli oftajn migradojn kaj esploradon de nekutimaj manĝaĵoj. Ĉar la nombro de la partoprenantoj estos limigita, jam rezervu por vi kaj por viaj geamikoj la alternativan amikigan jarfinan renkonton.

Zsófia Kóródy
Petro Zilvar

IFEF deziras tutmondiĝi

Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) estis fondita dum la 5a UK en 1909 en Barcelono. Ĝi refondiĝis post la dua mondmilito en 1948 en Amsterdamo. Ekde 1949 IFEF aranĝas ĉiujare sian kongreson.

La 63a IFEF-Kongreso okazos 7–14 maj 2011 en la ĉeĥa urbo Liberec, kaj la postkongreso 14–18 maj 2011 en kaj ĉirkaŭ Prago. La organizantoj kunlabore kun la Ĉeĥa landa asocio FISAIC ĈD preparas riĉan fakan kaj kulturalan programon kun interesaj ekskursoj.

IFEF havas Teknikan komisionon, kiu konsistas el Terminara kaj Fake Aplika Sekcioj.

La plej grava atingo de la Terminara Sekcio estas traduko de la seslingva terminaro de UIC (Internacia Fervojunio) kun pli ol 15 mil fervojfakaj terminoj. La lasta eldono de la terminaro estas akirebla en 20 lingvoj sur K-disko. La Fake Aplika Sekcio kompletigas la kongresan programon per 6–12 fakprelegoj aldone al la ĉefa prelego, kiun la organizanta lando preparas kaj prezentas.

Daŭre aperas la dumonata ilustrita revuo de IFEF, *Internacia Fervojo*, kaj revuoj de la landaj asocioj. La teknika komisiono de IFEF ĉiujare aperigas unu numeron de *Fervojfakaj Kajeroj* kun la plej valoraj fakaj prelegoj kaj aliaj tekstoj. Jam aperis 18 kajeroj.

Kelkaj landaj asocioj aperigas klarigajn tekstojn de la fervoja horarlibro en Esperanto.

9 okt 2009 estis inaŭgurita en la Esperanto-Muzeo en Svitavy ekspozicio, organizita kunlabore kun Ĉeĥa IFEF-Asocio, dediĉita al la centjariĝo de la fervojista Esperanto-movado. Ĝi estas vizitebla ĝis somero ĉi-jara.

La membraro de IFEF konsistas el aliĝintaj membroj de la landaj asocioj, individuaj membroj el landoj kie landa asocio mankas, honoraj membroj k. a. Krom plimultaj eŭropaj landoj ekzistas landaj asocioj en Ĉinio kaj Japanio.

Mi alvokas fervojistajn kaj alitrafikistajn esperantistojn aliĝi al la fervojista Esperanto-movado kaj fariĝi asociaj aŭ individuaj membroj de IFEF. Pluajn informojn vi povas peti de vialanda kontaktulo, de la ĉefkomitato Jindřich Tomíšek (✉ CZ-751 18 Øíkovice 33, Ĉeĥio, ✉ Tomisek.ck@seznam.cz), aŭ de la IFEF-kasisto Laurent Vignaud (✉ 3 Allée du Haras, App 132, FR-49100 Angers, Francio, ✉ laurent.vignaud@free.fr).

Jindřich Tomíšek



Jubileo en Pekino

22 jan en la Tibeta Halo en Pekino ĉ. 90 esperantistoj kunvenis okaze de la 30-jariĝo de la Pekina Esperanto-Asocio (PEA).

La prezidanto de PEA Nan Youli koncize resumis la laboron de la asocio. Li rakontis, ke PEA per Esperanto faris pozitivan kontribuon en plikonigado, aplikado, edukado kaj komunikado de Esperanto, kaj ankaŭ ludis gravan rolon en progreso de ekonomia kaj kultura servo en Pekino. Kiel la supera organo, la Pekina Federacio de Soci-Sciencaj Rondoĵoj konsekvence donas pli kaj pli fortajn helpon kaj apogon al la asocio. En la lastaj 30 jaroj PEA funkciigis pli ol cent Esperanto-kursojn elementajn, altgradajn kaj konversaciajn kaj sendis Esperantajn instruistojn al aliaj lokoj. La asocio kompilis kaj eldonis pli ol 20 Esperantajn librojn.

Vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo Yu Tao laŭtlegis gratulan mesaĝon de Chen Haosu, prezidanto de Ĉina Popola Asocio por amikeco kun aliaj landoj kaj de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj honora prezidanto de PEA. Guo Xiaoyong, vicprezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj Ĉina Esperanto-Ligo ĉeestis la kunvenon kaj en sia parolado alte taksis la gravan rolon de PEA por la Esperanto-movado en la pasintaj 30 jaroj kaj esprimis bondeziron al ĝia disvolvigo.

Faris gratulan paroladon ankaŭ Shi Qiuqiu, sekretario de la partia komitato de Pekina Federacio de Soci-Sciencaj Rondoĵoj. Ragnar Baldursson, islanda esperantisto kaj konsilisto en Ĉinio, rakontis siajn impresojn pri Ĉinio kaj ĝojon pro la rapida disvolvigo kaj granda progreso de Ĉinio.

Estas menciinde, ke veterana esperantisto Liu Ling, eksa ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, donacis al PEA dek mil juanojn por subteni Esperantajn aktivadojn kaj movadon en la ĉefurbo de Ĉinio.

ĈHC

Unumonata kursaro en Kantono

Dum unu monato, de 15 jan ĝis 14 feb 2011, en Kantono (Ĉinio) okazis la 2a Vintra Esperanto-kursaro (VEK), organizita de la Ĉina sekcio de ILEI. Dennis Keefe el Usono (nun laboranta en la Nankina Universitato) gvidis la kursaron uzante siajn BEK-lernolibrojn.

Partoprenis 30 personoj el Ĉinio kaj Vjetnamio, inkluzive de 12 studentoj malpli ol 24-jaraj kaj kvar universitataj instruistoj. La 2a VEK okazis sub la aŭspicio de Lin Liyuan — veterana esperantisto kaj prezidanto de la firmo pri eduka disvolvigo. Li provizis al VEK senpagan loĝejon, senpagan klasĉamboron kaj malmultekostajn manĝojn.

Gong Xiaofeng

Inter barataj skoltoj

Ĉirkaŭ ok mil barataj skoltoj 8–17-jaraj kaj pli ol mil “estroj” kaj stabanoj 4–12 jan 2011 partoprenis la 26an Karnatakan ŝtatan ĵamboreon en CRPF, Taralu Village, Kagalipura, Bangalore, Karnataka.

Kun permeso de la landa skoltestro, Kondajji Shanmukappa, la esperantisto Venki kun siaj familianoj aranĝis en la ĵamboreo budon de la Skolta Esperanto-Ligo en la Monda Vilaĝo por Evoluo. Ĉe la budo antaŭtagmeze okazis ĉiutage Esperanto-instruado al amaso da skoltoj kaj estroj. Posttagmeze oni provis praktiki la lingvon.

Pli ol 30 roveroj (pliaĝaj skoltoj), kiuj servis ĉe la ĵamboreo, post la vesper-programo havis 45 minutan Esperantan klason kiun ili petis. Post la naŭtaga lernado ili ricevis atestilojn.

Kelkaj skoltestroj kaj lernejestroj petis okazigi kurson de Esperanto en siaj lernejoj kaj promesis disvastigi Esperanton inter geskoltoj en siaj lernejoj.

A.S.Venkatesh Reddy

Meditadi Ŭonbulisme

La 6a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado okazis 9–12 jan en la suda urbo Iksan en Koreio. Organizis ĝin, kiel kutime, Esperantista Asocio de Ŭonbulismo, subvenciite de Internacia fako de Ŭonbulismo, korea eklezio.

Partoprenis 46 personoj el Koreio, Tajvano, Japanio, Irano, Tajlando kaj Ruslando — nombre kaj geografie pli multe ol en la kvin antaŭaj renkontiĝoj.

La programo estis riĉa kaj varia: de prelegoj pri piedomasago, Tajvano kaj Irano, ĝis kursoj de kuirado kaj korea pupfarado... Oni povis ricevi piedomasagon dum la tuta tempo de la renkontiĝo. Okazis tri ekskursoj, al kiuj multaj aliĝis. Esperanto-kurson por komencantoj gvidis Hong Sungcho kaj Reza.

La ĉeftemo de la renkontiĝo estis *Meditado*, kaj oni povis sperti ĝin ĉiumatene post la vekiĝo kaj ĉiuvespere antaŭ la dormo. Al ili aliĝis multaj por serĉi trankvilon de la korpo kaj animo.

La plej impresiga parto de la programo estis vizitoj al la eksa kaj nuna gvidantoj de Ŭonbulismo: majstroj Ĝūasan kaj Gjonsan. Ili tre favore parolis pri Esperanto kaj la simileco de la ideoj de la fondintoj de Esperanto kaj Ŭonbulismo. Tiu relative nova religio estas la kvara en Koreio laŭ nombro de la kredantoj, kaj ĝi havas multajn templojn en Koreio kaj alilande. En la Ŭonbulisma universitato Wonkwang Esperanto estas unu el klerigaj studobjektoj.

La partopreno de grupo da esperantistoj el Tajvano estis grava evento por la tajvana Esperanto-movado. Ĝin ebligis la instigo de Lee Jung-kee, prezidanto de la Seula Esperanto-Kulturcentro, kiu lastjare vojaĝis al Tajvano, kaj la favoraj kondiĉoj kiujn Internacia Fako de Ŭonbulismo proponis por la eksterlandaj partoprenantoj.

Reza Kheirkhah



Skoltoj kaj skoltestroj eklemas Esperanton.

Unufraze

★ Je 19 feb 2011 al la 96a UK en Kopenhago aliĝis 1035 personoj el 58 landoj; plej multe el Francio 139, Germanio 121, Japanio 78, Danlando 73, Pollando 62, Nederlando 53. (uea.org)

★ D-rino Meg Bianchi, reprezentis en februaro Kulturan Centron E-istan (KCE) en kunvenoj de la laborgrupoj de la Asocio de Lingvistoj en Eŭropo (ALTE) en Peruĝo; KCE invitis al Ĉaŭdefono (Svislando) dutagan kunvenon de la ALTE-laborgrupoj por septembro 2013. (HeKo)

★ Anneleen Nys el Belgio kadre de sia unujara Latinamerika vojaĝo post la pasint-somera partopreno en UK, IJK k ILEI-konferenco en Kubo, instruis Eon k informis pri ĝi en kelkaj urboj de Meksiko, Nikaragvo, Salvadoro k Ekvadoro. (Martin Schäffer)

★ En seminario okazinta 27–29 jan 2011 en la universitato de Mumbajo (Barato) Probal Dasgupta en la ferma parolado traktis la temon de la tradukado kiel esenca ekzistokondiĉo por tia multlingva respubliko, kiel Barato, k emfazis la rolon de Eo. (Probal Dasgupta)


★ 15 feb en la universitato pri interpretado en Strasburgo István Ertl k Cyrille Hurstel oficiale interpretis en Eon el la angla prelegon de Nicole Foss, kunredaktantino de Automatic Earth, kadre de la programo kunorganizita de la universitato k Cirklo de la katedralo, kiu kunigas asociojn kiuj rilatas kun la eŭropo de Strasburgo. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Okaze de la 10-jariĝa festo de la sistemo Ad-Words, la firmao Google produktis filmetojn por siaj elstaraj klientoj, interalie por la E-Centro *Eventoj* en Budapeŝto. (Ret-Info)

★ En la muzea nokto, okazinta 28 jan en Zagrebo, Kroata E-Ligo partoprenis per granda programo en la Kroata lerneja muzeo. (Spomenka Štimec)

★ La lasta ordinara sesio de la Parlamento de la Esperanta Civito dum la mandato 2007–2011 okazos en Milano 2–3 jun 2011 ĉe la sidejo de la Regiona Konsilio de Lombardio. (HeKo)

★ 13 feb 2011 aktivuloj de la Pekina E-Asocio (PEA) kunsidis en Emengrestoracio de nacimalplimulto Va por bonvenigi novan printempon, studi la Dek-duan Kvinjaran Planon de Ĉinio, diskuti kvinjaran planon de PEA (2011–2016) k interŝanĝi ideojn pri E-movado. (ĈIIC)



REK revenas al Ĉuvaŝio

En 2000 Ĉeboksary akceptis Rusian Esperanto-Kongreson (REK), kaj en la gastama Ĉuvaŝio ĝi pasis tre bone. Post 11 jaroj REK revenas al Ĉeboksary. Ĉi-foje ĝi estos unuigita kun Lingva Festivalo (LF) — la plej sukcesa aranĝo, kiun organizas esperantistoj por ekstera publiko. La unua Ruslanda LF okazis ĝuste en Ĉeboksary antaŭ 16 jaroj. La unuigo de LF kaj REK estas bonega ŝanco ĝui la unikan etoson de LF, konatiĝi kun la alloga urbo kaj kun la kulturo de Ĉuvaŝio, kaj samtempe viziti tradiciajn esperantlingvajn programerojn — prelegojn kaj koncertojn.

REK-27 okazos 20–23 okt 2011 en Ĉeboksary. Ĝin kunorganizas Rusia Esperantista Unio (REU) kaj Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (EAĈR).

En la programo: LF, scienca konferenco, Konkurso de Gajaj kaj Spritaj kun partopreno de urbaj teamoj, ekskursoj (en la urbo, en muzeoj Nacia, Belarta, Biera ktp), prelegoj kaj koncertoj, konferenco de REU.

Aliĝkotizo

Loĝantoj de	ĝis 1 jun 2011	ĝis 1 sep 2011	poste kaj surloke
Ĉeboksary	100 rub.	200 rub.	300 rub.
Ruslando / KŜŜ	300 rub.	400 rub.	500 rub.
Aliaj landoj	20 eŭroj	25 eŭroj	30 eŭroj

Rabato por la infanoj kaj adoleskantoj (20 okt 2011 malpli ol 18-jaraj): 50% de la kotizo.

Malrabato por nemembroj de REU kaj/aŭ EAĈR: 200 rubloj. La sumo estos pagata dum registrado en REK, la membreco estas kontrolata same tiam. La membreco en REU signifas ajnan membrokategorion krom “Amiko”.

La aliĝkotizo rajtigas je partopreno en ĉiuj eroj de la kongresa programo, inkluzive de la Lingva Festivalo. Ekskursoj estos pagataj surloke aparte.

Invitletoj por eksterlandanoj estas traktataj individue en ĉiu okazo.

Loĝado: en la urbaj hoteloj *Ĉuvaŝija* aŭ *Rossija* (<http://chebhotel.ru/>). Oni povas rezervi hotelĉambrojn memstare aŭ pere de la organizantoj. Malpli kosta varianto estas studenta komunloĝejo. Por ricevi garantiitan loĝlokon en hotelo aŭ komunloĝejo, oni devas menciigi sian bezonon ĝis 1 sep. Pli detala informo pri rezervado aperos poste.

Organiza komitato: Grigorij Arosev: kunordigo, programo, Aleksandr Blinov: enloĝigo, lokaj aferoj, Marina Ivanova: kasisto, Svetlana Smetanina: REU-parto.

Adresoj

Retadreso por diversaj demandoj: kongreso@reu.ru

Poŝta adreso por sendi aliĝkotizojn: 429951, Чувашия, Новочебоксарск, ул. Винокурова, 8-63, Марине Борисовне Ивановой.

Oni povas plenigi la aliĝilon rete: <http://reu.ru/kalendaro/alighilo/REK-27/> aŭ sendi informon pri la aliĝanto (nomoj, adresoj, telefonnumeroj, naskiĝdato) al la sama adreso. Krome funkcios kotizperantoj en kelkaj urboj. Iliaj nomoj estos anonc-itaj poste.

O. K.

249 tagoj sen registaro: Monda rekordo de Belgio

Dafydd ab Iago el Bruselo

Belgio ĵus atingis novan mondan rekordon. La 17an de februaro ĝi preterpasis Irakon, kiel la landon, kiu plej longe — dum 248 tagoj — restis sen registaro. En Belgio ekde la voĉdonoj la 13an de junio 2010 ne ekzistas federala registaro por gvidi la landon. Ja funkcias tri regionaj registaroj en Bruselo, Flandrio, Valonio, kaj la germanlingva registaro en la orienta parto de la lando. Tamen jam dum 249 tagoj belgaj politikistoj ne sukcesas formi novan federalan registaron.

Malgraŭ tio, ke la parlamento en Irako bezonis pliajn 45 tagojn por akcepti akordon pri la nova registaro, Belgio certe tenos la rekordon, ĉar ne estas eĉ plej malgranda ŝanco, ke Belgio havos federalan registaron en la spaco de 45 tagoj. La politikistoj daŭre ne kapablas interkonsenti pri bazaj principoj por formi registarakordon.

Kvankam en Flandrio gajnis la voĉdonadon partio kiu volas la (iom post iom) sendependiĝon, la lando plu funkcias. Kaj en la alia “flanko”, en Valonio, gajnis partio kun tute alia vizio de Belgio, sed ankaŭ tie la sub-nacia registaro funkcias. Tamen la reĝo, Alberto II, ŝajnas laca kaj jam okupigis longan liston de eminentaj politikistoj pri la tasko forlasi la sakstraton kaj solvi la diferencojn inter la partioj.

La malsimilaĵoj inter 6 milionoj da nederlandlingvanoj kaj 4.5 milionoj da franclingvanoj kristaliĝas en la politikaj vizioj de iliaj respektivaj partioj kaj politikistoj. La flandraj politikistoj ne volas akcepti, ke oni rajtas paroli franclingve en publikaj instancoj apud Bruselo (kvankam teritorie en Flandrio). Aliflanke, la franclingvaj belgoj malfacile akceptas ke ili devas lerni kaj uzi la nederlandan se ili volas vivi en Flandrio.

Lastatempe, belgoj iom pli humure rilatas al la krizo. Unu el la plej humoraj aliroj al la belga krizo estas la kampanjo en la retejo www.beardforbelgium.be. Tie oni alvokas la belgan



La urba placo de Bruselo (http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Brussels_Great_Marked_Square.jpg)

popolon, ĉefe virojn, sed, supozeble, ankaŭ virinojn, ne plu razi la barbon ĝis estos formita nova federala registaro. 35 tagojn post la unua alvoko estas pli ol 1000 barbuloj en la ttt-ejo. Tamen la organizanto de la kampanjo, la belga aktoro kaj humoristo Benoît Poelvoorde, ne kreskigas barbon. Li plendas, ke barbo kaŭzas al li alergian reagon kaj pro tio ne povas partopreni.

Ankaŭ la belga senatanino Marleen Temmerman lanĉis alvokon. La 9an de februaro ŝi alvokis aliajn politikistojn kaj ankaŭ la ĝeneralan popolon, ne plu seksumi ĝis naskiĝo de nova registaro. Temmerman memorigis, ke estas pluraj sukcesaj ekzemploj, kiam, ekzemple, virinoj rifuzis seksumi por atingi plibonigon. En 2009 estis seks-striko en Kenjo por haltigi la inter-etnan perforton. Kaj en 2006 amikinoj de kolombiaj gangsteroj rifuzis seksumi, ĝis iliaj viroj rezignis pri perforto. Kvankam tiu rifuzo ne plene sukcesis, oni notis rimarkindan falon de la nombro da murdoj en Kolombio.

Indonezio bezonas helpon

Du instruvojaĝoj al Indonezio havas kiel sekvon ke nun en pluraj insuloj estas homoj kiuj scias pri Esperanto kaj eĉ eklernis ĝin, kaj en du urboj estas aktivaj kluboj (kaj en aliaj urboj oni provas starigi klubon aŭ almenaŭ kune lernas). Tamen la movado en Indonezio ankoraŭ nek grandas nek fortas, kaj bezonas nian helpon. Estas pluraj manieroj tion fari.

Eblas sendi librojn al la kluboj, precipe anglalingvajn lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankaŭ bazajn librojn, ekzemple: PIV, la Fundamento aŭ malgrandaj (bild)vortaroj. Petu min pri la adresoj.

Alia ebleco estas “kanutigi” indonezianojn. Estas pli da indonezianoj kiuj meritas fariĝi UEA-membro, ol la Fondaĵo Canuto povas subteni. Pluraj el ili sciigis al mi, ke se ne eblas ricevi papere, por ili sufiĉas ricevi rete la revuon *Esperanto*. Tia membriĝo kostas nur 12 eŭrojn kaj eblos donaci ĝin al pli da homoj. Se vi volas tion fari, bonvolu ĝiri vian subtenon al la Fondaĵo Canuto kun mencio “por indonezianoj”.

Alia plano estas venigi almenaŭ po unu indonezianon al UK kaj IJK ĉi-jare. Helpu al ili kaj ĝiru al la konto “azio” de UEA kun mencio “indonezianoj al UK/IJK”, por ke, fine, denove estu iu(j) el tiu grandega lando en niaj plej gravaj kongresoj. Antaŭdankon ilianome.

Por pliaj informoj: ✉ heidi.goes@gmail.com

Heidi Goes

Bedaŭrinda nemencio

En LODE, 2011, №2, p. 21, aperis salutinda prezento de la multlingva forsta fakvortaro *Lexicon silvestre*. Prof. Hans Dieter Quednau el Germanio detale informis pri la libro kun eseoj de d-ro Karl-Hermann-Simon kaj pri la unika faka vortaro. Bedaŭrinde li simple ne mencias, ke la libron iniciatis, komplete kompilis kaj redaktis du personoj: la nuna prezidanto de la “Subtena Asocio Lexicon silvestre”, Stefan Panka, kaj mi mem. La prefacon verkis prof. Klaus Schubert de la universitato Hildesheim. Ĉu redaktan laboron oni simple ignoru?

Detlev Blanke

Kunkantu en Sarajevo

Nova kulturagado aperis en Esperantujo: la franca koruso *Interkant* kun 50 korusanoj, du solistoj kaj kvin muzikistoj. En ĝia repertuaro estas la *Kanto Ĝenerala* kun vortoj de Pablo Neruda kaj muziko de Mikis Teodorakis. Krom en Francio ĝi prezentiĝis en la franc-germana Esperanto-kongreso en Kaiserslautern kaj en la Universala Kongreso en Kubo en 2010.

En 2011 la koruso *Interkant* planas koncerti en Sarajevo dum la 84a kongreso de SAT. Sed ĝi preferus internaciigi per kantistoj el pluraj aliaj landoj. Se vi do estas kantema kaj iom sperta pri korusa kantado, kaj se vi estus vojaĝema al Sarajevo, petu vian partituron kaj kontakto la ĥorestrinon Franjo Leveque: ✉ leveque.franjo@gmail.com.



Éva Farkas-Tatár

altkvalita Ĉe-instruistino

Dum la 49a Universala Kongreso en Hago en 1964 Andreo Cseh [Ĉe] decidis por la lasta fojo gvidi Ĉe-seminaron. La motivoj de la ĉirkaŭ 20 partoprenantoj estis diversaj: kelkaj utiligis la okazon por scivole spekti la legendulon, aliaj volis travivi plezurajn horojn kaj manpleno pro respekto klopodis altigi la nombron de la rondo. Ne tre fekunda tero por kreskigi freŝajn Ĉe-instruantojn.

Sed unu escepta persono ĉeestis. Temis pri Éva Farkas-Tatár [Farkaŝ-Tatar], juna virino el Hungario, speciale veninta por akiri la lecionojn de la majstro mem. La grandaĝulo ne nur transdonis al ŝi sian metodan konon, sed ankaŭ, kaj plej grave, inspiris ŝin daŭrigi pli intense la Ĉe-instruadon. La studentino ricevis de li — kiel ŝi poste diris — la tiam jam rarajn kursajn “relikvojn”: la gumajn hundon kaj katon, la kolorpapirojn kaj skatoletojn, krome la tradician stencilitan kurs-tekston en la ruĝkartona mapo. Kiu estis Éva Farkas-Tatár?

En 1961 kiam Éva, edzino de fama pastoro en Budapeŝto kaj patrino de pluraj infanoj, fariĝis 37-jara, ŝi pli kaj pli sopiris al iu intelekta laboro. Ŝi aŭdis pri Esperanto kaj eklernis ĝin. Pro tio, ke la nova adepto de Zamenhof volis ankaŭ konatiĝi kun la internacia Esperanto-vivo, ŝi vojaĝis en 1962 al la 47a UK en Kopenhago. Tie vere kaptis ŝin tiom da entuziasmo, ke ŝi decidis fariĝi instruistino de la lingvo.

Reveturinte en Hungario, Éva serĉis kontakton kun la ankoraŭ aktiva Tibor Réthelyi [Retheji]. Ĉi tiu maljunulo jam dum 1932–1934 pasigis tempon en Svedio kiel Ĉe-instruisto. Li konsilis al sia nova lernantino alproprigi la rektan metodon, dum ŝi helpis lin en liaj Ĉe-kursoj. Tiel ŝi lernis tiun specifan metion. Tibor atentigis la asistantinon pri ora ŝanco: Andreo Cseh gvidos Ĉe-seminaron

en Hago dum la UK en 1964. Kial ne aliĝi? Dum la edifa rilato kun Cseh ŝi ricevis la definitivan konvinkon.

Ankaŭ aliaj Esperantaj okupoj trudis sin al la nova samideanino. En 1966 okazis en Budapeŝto la 51a UK. Pro la alfluo de sennombraj aliĝoj — oni registris 3975 personojn — ĉiu esperantisto en ŝia hejmurbo devis kunhelpi en la realigo de tiu evento. Éva komencis krei sian reton de verdaj konatoj: ofte parolis kun Ivo Lapenna, amikiĝis kun la bulgario Nikola Aleksiev, la prezidanto de MEM, la tiama kontraŭpartio de UEA en la komunisma Orienta Eŭropo.

Kelkajn jarojn poste Réthelyi mortis, kaj Éva transprenis lian instrulaboron. En tiu periodo filino ŝia fuĝis al Usono. Laŭ la komunisma ideologio la gepatroj kulpis, kaj la reĝimo punis ilin per malpermeso de eksterlandaj vojaĝoj. La patrino estis blokita en sia lando.

En la 1970-aj jaroj multo ŝanĝiĝis ĉe Internacia Esperanto-Instituto (IEI). Ĝia estraro, la filinoj de Isbrücker, forigis Andreon Cseh el la domo en Riouwstraat kaj klopodis plenigi la vakuon per aliaj esperantistoj. Prezidanto de la estraro fariĝis notario, baldaŭ poste malliberigita pro fraŭdo; direktoro en la oficejo fariĝis en 1975 Adriaan Breddels, multjara verdstelulo, kiu ne povis majstri tiun malfacilan funkcion. Li kvar jarojn poste ekŝiĝis.

Anoncis sin en Riouwstraat la polino Mila Kolińska, edzino de la nederlandano Gerard van der Horst. Ŝi vidis, ke la libervoluloj en la sidejo malzorgis la esencan taskon de IEI, nome la aranĝon de la Ĉe-instruado. Ŝi decidis dediĉi sin al tiu specifa kampo kaj dum 25 jaroj tie sindone plugis, semis, rikoltis. En UEA estis atingita la enprogramigo de tiuspeca kurso dum la UK-oj. Mila estis tamen

konfrontita kun manko de Ĉe-instruistoj, sed fine persvadis la tre maljunan Madeleine Haudebine. Tiu francino cedis al ŝia peto kaj instruis en Ateno (1976) kaj ankoraŭfoje en Reykjavik (1977).

Finfine en 1978 Éva Farkas-Tatár rajtis denove transiri la hungarian limon. La birdo elflugis el la kaĝo. Ŝi enskribis sin por la 63a UK en Varna (Bulgario) kaj informis Aleksiev-on pri sia veno. Li siavice kontaktis Mila-n, ĉar tiu ĉi serĉis instruistojn por la Ĉe-kurso kaj -seminario. Li rekomendis sian konatinon pro ŝiaj didaktaj kapabloj. Kvankam Mila ne sciis pri la sinjorino, ŝi akceptis ŝin por la kurso, sed sendis Breddels el Hago por kontroli la lecionojn.

En Varna Éva neatendite staris antaŭ serioza tasko: la salonego entenis ĉirkaŭ 200 homojn, kiuj volis lerni Esperanton aŭ gustumi la Ĉe-metodon. Kia fortostreĉo! La pedagogino brave trabatis sin kaj la Haga observanto laŭde raportis al Mila. Li male karakterizis la instruanton de la seminario. Estis bulgario, tro ofte ludanta violonon kaj daŭre ĉion skribanta sur la nigra tabulo. Elementoj, fremdaj al la Ĉe-metodo.

Kiel Éva Farkas-Tatár tiel sukcesis? Por kompreni, oni devas scii, ke ŝi ne sklave sekvis la metodon, kiel ĝi estis priskribita en la sveda modelo, publikigita en 1928 kaj de tiam kvazaŭ preskribita kiel leĝo por Ĉe-instruistoj. Tiun misan evoluon, ankaŭ ne deziritan de Andreo Cseh mem, ŝi ignoris. Ŝi reiris al la kerno de la Ĉe-kurso. Ne la leksiko aŭ la rangordo de kaŝaj gramatikajoj estas decidaj, sed la spirito kaj nur la spirito de la metodo — nome la gaja, luda maniero, en kiu lernantoj tuj komencas paroli Esperanton.

Unu ekzemplo: pro subita situacio demonstri dum leciono la transitivitecon kaj netransitivecon de verboj, ŝi

elektis la vorton *rompi*. Éva rompis permane longan kreton kaj diris: “mi rompas la kreton”. Poste ŝi rekte starigis alian samlongan kreton sur la tablo kaj nevideble ekpuŝis la tablorandon. La kredo falis. Ŝi diris: “la kredo rompiĝas”. Tia krea laboro postulas konstante la spontanee trovemon kaj inventadon de la instruanto depende de loko kaj publiko. István Szerdahelyi parolis pri la *didaktikaj artifikoj de Éva Farkas*. Ne tute prave, ĉar tiaj lertaĵoj estas imantaj al la vera Ĉe-kurso. En la sepdekaj jaroj Éva Farkas-Tatár markis tiun novan vojon de la Ĉe-metodo.

Post la sukceso de Éva en Varna ŝi estis promociita al docento de seminarioj. En la 64a UK en Lucerno (1979) ŝi kondukis 10–15 kandidatojn al la diplomo pri Ĉe-instruiteco. Egale nombron ŝi pretigis en la 67a UK en Antverpeno (1982). La apoteozo de ŝia Ĉe-laboro okazis en la Pekina UK en 1986. Tie la hungarino transprenis denove la Ĉe-kurson. La pli ol 200 partoprenantoj prezentis buntan paletron el precipe neeŭropaj landoj. Svarmis antaŭ ŝiaj okuloj dekoj da homoj el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Aŭstralio. Tiun tutgloban aŭskultantaron ŝi neniam spertis, sed nun ege ĝuis. Ŝi akceptis la defion kaj venkis.

Viglo kaj aktoreco, necesaj ingrediencoj por Ĉe-instruistoj, malprogresas dum la pliaĝado. Estas saĝe, ĝustatempe halti kaj tion Éva faris. Digna adiaŭo el la Ĉe-areno. Laboro finita, sed ripozo merita ne apartenas al la proverbaro de la hungara fervorulino. Trudis sin aliaj taskoj en Esperantujo, kiel ĉe Kristana Esperanta Ligo Internacia kaj ĉe la Esperantaj elsendoj de Radio Budapeŝto. Ankaŭ sur tiuj terenoj ŝi nelacigeble agadis.

En iu UEA-kongreslibro mi legis post ŝia nomo la indikon *dommastrino*. Éva estas pli, multe pli.

Ed Borsboom



Ĝisdate pri E@I

La organizo “Edukado@Interreto” (www.ikso.net) ne povas plendi pri manko de novaj ideoj kaj projektoj. Ofte ĝi havas multe pli da ideoj, ol da tempo aŭ financoj por realigi ilin ĉiujn. Tamen la jaro 2011 ŝajnas esti fruktodona por kelkaj novaj iniciatoj. Sube estas detaloj pri la plej “varmaj” projektoj/produktoj de E@I, kiuj ĉi-jare aperos.

Retejoj

aktuale.info — Jam en sekvaj semajnoj estos lanĉita multlingva, amaskomunikila agentejo por Esperanto. La retejo volus liveri en multaj lingvoj diversajn aktualajn informojn pri la E-movado, pri agado de esperantistoj kaj pri lingvaj temoj. Helpo pri tradukado de tekstoj, same kiel pri la verkado de gazetaraj komunikoj kaj artikoloj estas bonvena: <http://testo.aktuale.info/eo>



bretaro.net — Enreta Esperanto-Biblioteko devos same aperi ĉi-printempe kun la celo disponigi rete komunan lokon por stokado de plej diversaj E-materialoj en cifereca formo (libroj, gazetoj, fotoj, sonoj ktp.) kaj ebligi ties vastan uzadon (eblos libere alŝuti kaj elŝuti la materialon): <http://www.csweb.sk/bretaro/web/novajoj>

espa2.eu — EU-projekto, en kiu estas E@I partnero. Temas pri instru-retejo de la hispana lingvo, kun la merkata kaj komerca lingvaĵo. La paĝaro samtempe ebligas kontakt-trovadon/peradon inter Hispanio kaj la aliaj EU-landoj por komerco.

komputeko.net — Estas planata rekonstruo de la retejo, kun multaj pozitivaj ŝanĝoj: pli facila administrado, pli da lingvoj, pli da funkcioj. Aldone al la libro do ankaŭ reta versio aperos ŝajne ĉi-jare en dua eldono.

slovaĝe.eu — Jam en marto estos lanĉita beta-versio de la granda EU-projekto, plurlingva retejo por instrui la slovakon al eksterlandanoj. La projekto baziĝas sur la sukceso de lernu.net, ĝi estos unua naci-lingva instrua retejo de E@I.



vortaro.net — Daŭre okazas mon-kolekta kampanjo por la reta versio de la Plena Ilustrita Vortaro. Kunlabore kun SAT, zorgos E@I pri ĝia aperigo. Se oni sukcesos kolekti sufiĉajn financojn, la reta PIV (kun multaj aldonaj funkcioj) aperos jam ĉi-jare.

Eldonaĵoj

Esperanto elektronike — Kvin jarojn post ĝia unua eldono verŝajne aperos la tria, korektita kaj aktualigita eldono de la fama DVD, de kies unuaj du eldonoj estis kune presitaj 12.000 ekzempleroj. E@I lanĉos novan mendo-kampanjon kaj proponos bonegan prezon de la disko.



KAEST-prelegkolekto — Ĝis la somero aperos libroforme prelegoj de la last-novembra Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kies organizadon pasintjare E@I transprenis (<http://kaest.ikso.net/>).

Libro **Komputeko** — Se ĉio iros glate, aperos jam somere dum UK nova, korektita, ŝanĝita eldono de la komputila termino-kolekto: www.komputeko.net.

Malkovru Esperanton — Aperos pluraj nacilingvaj paperaj eldonoj de la populara informbroŝuro pri Esperanto (<http://www.ikso.net/eo/brosuro/>).

Aranĝoj

UK — Kunlabore kun UEA zorgos E@I pri la programo de la terminologia forumo, kiu prezentos la plej lastajn atingojn en la kampo de “faka lingvo en la reto”.

SES 2011 — La 4a renkontiĝo de lernu-uzantoj dum la Somera Esperanto-Studado okazos 30 jul – 7 aŭg 2011 en Slovakio. Lernejo kun kvin lingvo-niveletoj, agrabla etoso, interesa kaj riĉa programo — tiel aspektos ankaŭ ĉi-jara SES: www.lernu.net/ses.



Vikimano — helpante pri la organizado, varbante kaj prelegante/instruante, E@I helpas realigi la unuan Esperantan renkontiĝon de vikipediistoj oktobre en la Esperanto-muzeo, en la ĉefa urbo Svitavy: www.vikipedio.net.

Kaj ni en E@I esperas, ke ankaŭ la legantoj de *La Ondo de Esperanto* emos helpi pri iuj el ili, aŭ almenaŭ decidus utiligi ilin por sia E-agado.

Kontaktadreso: estraro@ikso.net

Peter Baláž
E@I-kunordiganto

Pri Esperanto-balbutantoj

Mi dankas al s-ro Germain Pirlot pro lia sincera kritiko (en la februara *Ondo*) kontraŭ la reta nombrado de Esperanto-parolantoj, kiun mi ekigis.

Ke la projekto plaĉos al ĉiuj, mi ne atendis, kaj fakte ne okazis. Sed mi ricevis tiel multe da entuziasmaj komentoj fare de personoj el ĉia deveno (Ĉinio, Mongolio, Venezuelo, Irano, Georgio, Islando, Slovenio...), ke eble mi rajtas ne rigardi mian klopodon kiel fiaskon; nelaste ĉar temas pri persona iniciativo, hazardo naskiĝinta el nenio de la apartamento de unuopa “sendependa” parolanto.

Mi vidas, ke oni ankoraŭ timas la malicaĵojn de la malamiĝoj de Esperanto — kvazaŭ enrudulaj najbaroj — forgesante ke, kion ajn ni faras, ili ĉiam trovos motivojn pro kritiki kaj priridi nin. Eĉ se ni atingus la sojlon de 2.000.000 da subskribantoj, ili asertus, ke la projekto estas “gvidata”, ĉu ne vere?

Permesu al mi opini, ke atinginti 1370 tutmondajn parolantojn/skribantojn (aŭ eĉ balbutantojn) de Esperanto en nur du monatoj ne estas bagatelo. (Kiom da parolantoj atingas ĉiujare la Pasporta Servo, tiel reklamata kaj sponsora?)

Eĉ konsiderante, ke ĝis nun nur 0,1% de la parolantoj ricevis, komprenis kaj akceptis la inviton subskribi tiel “malutilan” peticion — nelaste ĉar en multaj landoj de la mondo, kiel oni prave rimarkis, pro aĝaj kaj aliaj kialoj, oni ne havas liberan aliron al Interreto — statistiko ebligas al ni hipotezi la ĉeeston de 1.370.000 homoj, kiuj iel konas Esperanton. Ĉu tio malmultas?

Iel ajn, tia projekto — spite al ĉiuj ĝiaj limoj kaj difektoj, kiujn ĝi ŝuldas al sia amatora naturo — ŝajnas al mi pli interesa ol aliulaj nuraj konjektoj pri supozita ĉieesteco de Esperanto-*al*parolantoj sur la ter globo (kaj eble eĉ ekster ĝi): mia instruistino klarigis al mi, ke pli precizas horloĝo nefunkcianta ol proksimuma, ĉar la unua almenaŭ dufoje tage indikas la ekzaktan horon, dum la dua faras tion neniam. Do, ĉu ne preferindas 1372 parolantoj certigitaj al ses milionoj da fantomoj absolute nekapteblaj?

Cetera la historio de esperantismo montras, ke multaj aferoj en tiu movado havas neniun rilaton kun realismo, krom se iuj el vi kredas, ke vere EU povus rezigni pri ĉiuj siaj tradukistoj kaj ke, kvazaŭ pro magiaĵo, la tuta Eŭropo povus en rekorda tempo tiel bone eklerni Esperanton, por facile uzi ĝin internacie — anstataŭ la anglan aŭ la ĉefe uzatajn lingvojn — okaze de sciencaj aŭ medicinaj kongresoj, konferencoj pri klimato kaj seancoj de la eŭroparlamento.

Se estas vere, ke esperantisto ofte sinonimas kun utopiisto, bonvolu lasi min kaj la ceterajn subskribantojn marŝi procesie kaj eĉ “balbuti” kun fiero nian Esperanton ĉe tiu retpaĝo. Lecionoj pri retoriko ne interesas nin: ni volonte lasas ilin al la elitoj. Tie, kie ni pace kaj utopiiste renkontiĝis — ĉu kun, ĉu sen fina akuzativa “n” — ni ĝenas neniun kaj, se oni ne ŝatas la iniciativon, se oni sentas sin supera aŭ se tiel multon kostas al oni ĝin subskribi (tio eblas eĉ anonime), oni pasigu — kun nia aprobo — sian tempon vizitante aliajn retejojn.

Roberto Pigo

Kreinto de la peticio

<http://www.thepetitionsite.com/1/esperanto-parolantoj-en-la-mondo/>

“Neniigu la landlimojn per Esperanto!”, — sub ĉi tiu titolo, en la februara numero de la dumonata gazeto *Baraka* de la Mezorienta Teknika Universitato (METU) en Ankaru (Turkio) aperis tripaĝa ilustrita intervjuo kun la turka esperantisto Murat Ozdizdar.



Kiel kondukti en Danlando?

Parolu kun iu dano pri elstarajoj de alilandaj eminentuloj, kaj, kredeble, post nelonge li diros al vi, ke en Danlando ja regas la regularo de Jante kaj ke ili devas — ĉu vole aŭ nevole — “obei” al ĝi. Do ni preparu nin al la ĉi-jara kongreslanda mensostato.

La dekalogo de Jante

La regularo de Jante fontas el romano de Aksel Sandemose (1899–1965). Li havis danan patron kaj norvegan patrion. Li kreskis en la dana provinca urbo Nykøbing sur insulo Mors, longe for de la ĉefurbo¹. Sandemose kvazaŭ fuĝis de Danlando al Norvegio, kaj ekde tiam li verkis en la norvega lingvo. La romano *En flyktning krysser sitt spor* (Fuĝinto transpaŝas siajn spurojn) estis verkita en 1933 en la norvega. Evidente estas malica saluto al la hejmurbo. Nykøbing paradas en la romano kiel Jante. Neniu individua vivo estas allasebla tie, ĉiu spuro de alternativa vivmaniero sufokiĝas pro la regularo de tiu urbo.

1. Ne kredu, ke vi estas io grava.
2. Ne kredu, ke vi egalas al *ni*.
3. Ne kredu, ke vi estas pli saĝa ol *ni*.
4. Ne konduku vin al la rezono, ke vi estas pli bona ol *ni*.
5. Ne kredu, ke vi scias pli ol *ni*.
6. Ne kredu, ke vi valoras pli ol *ni*.
7. Ne kredu, ke vi taŭgas.
8. Ne priridu *ni*.
9. Ne kredu, ke iu zorgas pri vi.
10. Ne kredu, ke vi povas instrui al *ni* ion ajn.



Aksel Sandemose

Ni ja estas malgranda lando

En malgrandaj socioj la individuo estas travidebla: ĉiuj scias ĉion pri ĉiuj. Plej gravas esti kiel la aliaj ol lumi per si mem. Plej bone estas vivi konforme kun la aliaj bone edukitaj anoj de la anasejo. Se vi iel malkonformas, se vi estas alispeca aŭ eĉ malbela anaseto, ili konkludas: “Tion ni ne toleros inter ni”. Kaj se vi hazarde estas naskita kiel cigno, tiam la vivo povas esti malfacila inter anasoj.

Aliflanke ne ĉiu nekonformulo aŭtomate estas genio: memtakso kiel bela cigno foje, eble eĉ ofte, malkongruas kun la percepto de aliaj, ĉu malbelaj anasoj aŭ ne. Ekzemple mi vidis en Danlando, ni diru, kontroversan sporttrejniston kun la slogano *Fek’ al Jante-regularo* sur la T-ĉemizo; ŝi komprenis sin mem genia kaj miskomprenita de la plejmulto — la plejmulto tamen opiniis, ke ŝi estas kapabla trejnistino kaj ke ŝi kondukas nekredeble vulgare. Sakri kaj kriaĉi pri la opinioj de la aliaj anasoj ne estas sufiĉa kriterio por genieco.

Alia ekzemplo estas financisto, kiu ne nur ĵonglis kun la mono de investantoj, sed ankaŭ havis evidente malmulte da respekto por ekzistanta leĝo, tial li ŝtelakiris la monon de stultaj anasoj — alivorte: krimulo en vestokompleto. Ankaŭ li referencis al la dekalogo de Jante por pravigi siajn transakciojn. Ĉu li prave referencis al la dekalogo, aŭ ĉu li ne kapablis trovi alian senkulpiĝon por siaj “nekonvencijaj metodoj”?

Danlando estas malgranda lando (iu diris: ridinde malgranda) kaj relative homogena kulture. Tiusence Danlando povus simili al la parodio de anasejo. Sed ĉu tio estas malbona kvalito? Ĉu interkonsento en la socio povas esti pozitiva

eco? Ĉu interkonsento en la socio povas esti alia vorto por solidareco?

Malmultaj havas tro

Istoj de la socio asertas, ke la konduto de Janteanoj respegulas la deziron de skandinavo por egala socio en troiga formo, kie regas konformismo kaj unuopinia diktaturo. Kontraste al la mondo, kie malmultaj havas tro, kaj tro multaj havas maltrou. En la dana socio estas la opinio, ke la rimedoj estu dividitaj egale, alivorte: “Ne kredu, ke vi povas akapari pli, ol vi bezonas”.

Jam en la komenco de la 19a jarcento la dana poeto kaj politikisto N. F. S. Grundtvig (1783–1872) priskribis tiun idealon — socion, en kiu malmultaj havas tro kaj pli malmultaj maltrou. Por akiri tian socion en paca maniero nepre bezonatas iu interkonsento en la socio. Tio estas la vojo de “aurea mediocritas”, la ora moderemo.

Moderemo ne estas amiko de ekstretoj, sed ĝi ankaŭ povas konduki al malminenteco. Tial vi probable spertos en Danlando la senton, ke iu elstara estas deklarata kiel “sufiĉe bona” — oni ne fanfaronu. Tio estas finfine ankaŭ la paradizo por tiuj, kiuj nur liveras tion, kio estas ne pli ol “sufiĉe bona”.

Iu dana sociologo diris: “Ni ne emas admiri. Kaj tiu eco estas bona rimedo kontraŭ la kulto de personoj”. Tial danoj volonte serĉas kompromison; evitas ekstremismon. La dekalogo de Jante priskribas homogenan socion, kiu klopodas inkluzivi. Ĉio ŝanĝiĝas — ankaŭ socioj. Nuntempe ankaŭ la dana socio fragmentiĝas kaj disfalas je pluraj paralelaj kulturoj kaj subsocioj; la ĝenerala konsento pri tio, kio estas bona aŭ malbona, estas malaperanta. Ĉu tio estas malbona, aŭ ne?

Decidu laŭ via propra vidpunkto. Unu konsekvenco de la malapero de la socia interkonsento kaj solidareco estas, ke, se okazus nova okupacio, certe ne reokazus nova septembro 1943 — tiam danoj kvazaŭ komune savis la judan loĝantaron kontraŭ la persekuto de la nazioj. Tamen eble solidareco kaj malorgojlemo ne estas tiom malbonaj en bona modera socio — se ĝi ne sufokiĝas pro memkontento.

Wolfgang Kirschstein

Noto

1. La etoson de ĉi tiu socio bone kaptis Hans Kirk, kies romano *Taglaboristoj* troviĝas en Esperanta kostumo. Sed *Fiŝkaptistoj* estas pli fama.



Dank' al Dio

de Edmund Grimley Evans

Maria paŝis supren laŭ la ŝtuparo, direkte al la fako por kanceropacientoj. Laca, ŝi haltis dum momento, kie la ŝtuparo turniĝis maldekstren. De dek horoj ŝi estis sur la piedoj, de kiam ŝi ellitiĝis en la mallumo por melki la bovinojn. Aliaj homoj, miksaĵo el dungitoj en blankaj kiteloj kaj vizitantoj en vintraj manteloj, preterpuŝiĝis. Kun siaj malnovaj vestoj kaj kaptuko, Maria estis iom rimarkinda figuro en la urbego, sed neniu el la preterhastantoj ŝajnis rimarki ŝin.

Ĉe la enirejo de la granda halo Maria hezitis. Fine unu el la flegistinoj rimarkis ŝin kaj demandis, kion ŝi volas.

— Mi volas vidi mian edzon, Johanon Mayer, — ŝi diris.

La flegistino, mediteraneaspekta junulino, ŝajne ne komprenis ŝian kamparan dialekton, sed unu el ŝiaj kolegoj alkuris kun aro da paperoj, tra kiuj ŝi rapide foliumis.

— Ĉu Mayer kun “y”? — ŝi demandis.

— Jes.

— Momenton.

La flegistino forhastis denove. Kiam ŝi revenis, ŝi diris:

— Li ne plu estas ĉe ni.

Maria eksentis glacieron en la koro. Eble la flegistino divenis ŝian penson, ĉar ŝi rapide aldonis:

— Oni movis lin al ĉambro 3041.

— Kial oni movis lin?

— Mi ne scias. Mi supozas, ke li ne plu bezonas intensan flegadon.

— Dank' al Dio, — Maria flustris al si, dum ŝi reiris laŭ la koridoro.

— Dank' al Dio, — ŝi ripetadis al si, dum ŝi grimpis denove suben laŭ la ŝtuparo tra pluraj etaĝoj.

Ŝi preĝis ĉiunokte, ke ŝia edzo resaniĝu. La kuracisto diris, ke lia kazo estas serioza, sed ili ne diris, ke estas senespere. Eble ŝiaj preĝoj estis aŭditaj. Eble li eĉ povos reveni hejmen baldaŭ. Eĉ helpi ŝin en la bieno. La pasintaj kelkaj semajnoj estis ja tre malfacilaj por ŝi. Dank' al Dio, ke la infanoj estas jam pli grandaj. Baldaŭ ankaŭ Petro, la plej juna, estos memstara kaj povos forlasi la gepatran hejmon.

Ĉambro 3041 estis tute alia ol la halo, kien ŝi iris antaŭe. Ĉio aspektis malpli moderne, malpli lume, malpli purigite, sed la ĉefa diferenco estis la relativa silento kaj manko de homoj.

Flegistino sidis en eta oficejo kun malfermita pordo, skribante ion, sed Maria ne devis demandi, kie estas Johano, ĉar ŝi jam povis vidi lin. Li kuŝis sur lito en la angulo, videbla de la enirejo. Tamen, se li ne havus la vizaĝon turnitan al ŝi, ŝi ne tuj rekonus lin, ĉar li multe ŝanĝiĝis.

Maria paŝis ĝis lia lito kaj rigardis la maldikan, preskaŭ skeletan korpon de sia edzo, kiu turnetis la kapon por rigardi ŝin, sed montris nenian esprimon sur la vizaĝo.

— Kie estas viaj vestoj? Kial oni ne kovris vin? — ŝi demandis.

Johano movetis la lipojn, sed nenio aŭdeblis.

Dum Maria ĉirkaŭrigardis senhelpe, la flegistino alvenis.

— Kial li ne havas littukojn? — demandis Maria.

La flegistino levetis la ŝultrojn.

— Kie estas la kuracistoj?

— Ĉu la kuracisto ne jam parolis kun vi?

— Jes, sed li estis tre okupita, kiam mi venis antaŭ unu semajno...

— Mi vidos, ĉu mi povas venigi iun, — diris la flegistino, kaj ŝi reiris al sia angulo por telefoni.

— Johano? — flustris Maria.

Li ne parolis, sed ŝajnis al ŝi, ke liaj okuloj briletis.

— Ĉio iras bone. Mi volas diri, mi elturniĝas. Petro helpas pri la kokinoj. Mi melkas kaj nutras la bovinojn akurate ĉiutage. La tutbruna dujara resaniĝis, sed la bestokuracisto diris pri la alia...

La kuracisto jam alvenis. En la angulo la flegistino kaj li flustris inter si.

Maria elmetis manon kaj tuŝis la manon de sia edzo. Ŝi pripensis, ĉu pardonpeti pro tio, ke ŝi ne venis pli frue, sed ŝi sciis, ke ne necesas. Li jam komprenas tion. Estas longa vojo ĝis la urbego, kaj estas multaj farenadaĵoj en la bieno.

Tuseto atentigis ŝin, ke la kuracisto jam staris ĉe ŝia flanko.

— Sinjorino Mayer?... Mi esperis paroli kun vi pli frue...

— Mi ne povas veni krom sabate, kiam mia filo ne iras en la lernejon.

— La stato de via edzo estas nun tre serioza...

— Kial li ne havas littukojn?

— Ni povas trovi littukojn, se vi volas, sed tio ne multe helpos lin, bedaŭrinde...

— Estas hontinde lasi lin tiel nuda sur la lito!

La kuracisto turnis sin al la flegistino.

— Ĉu vi povas?..

— Mi alportos littukon, — ŝi diris, kaj ŝi forhastis.

— Sinjorino Mayer, se vi volas resti ĉe li ĉi tie, vi povas. Tial ni alportis lin ĉi tien, kie estas pli trankvile. Verŝajne daŭros ankoraŭ nur kelkaj horoj... Certe li ŝatus, se...

— Li ŝatus havi littukojn. Estas hontinde lasi lin tiel nuda sur la lito. Li povus morti pro malvarmumo.

Maria ĝojis, kiam la kuracisto kaj la flegistino forlasis ilin. Ŝi ne volis paroli al Johano, dum ili ĉeestis, ĉar ŝi ne povus aŭdi liajn respondojn. Nun ŝi ridetis al li, kaj liaj okuloj ŝajnis danki ŝin. Li havis tiel belajn okulojn. Ja li multe ŝanĝiĝis dum la kvardek jaroj, dum kiuj ŝi konis lin, sed tiuj okuloj restis tute samaj kiel en la tago, kiam ŝi unue ekvidis lin, dum tiu kermeso, la unua kermeso post la milito. Ŝi memoris, kva-zaŭ estus hieraŭ, kiel ili manĝis kaŝtanojn kaj promenis man-en-mane. Eĉ laodoro de tiuj kaŝtanoj revenis al ŝi, kaj la kermesa muziko ŝajnis ankoraŭ soni en ŝiaj oreloj.

— Johano?

— Ĉio iros bone!

— Petro helpas pri la kokinoj.

— Ni elturniĝas.

— Vi scias, ke mi baldaŭ devos foriri...

— Mi devas nutri la bovinojn. La bruna resaniĝis.

Ŝi ne sciis, kiel adiaŭ lin. Nek “ĝis la revido” nek “adiaŭ” ŝajnis bona. Anstataŭe ŝi diris ion, kion ŝi de longa tempo ne diris, sed nur ĉar ne necesas ĉe ili. Ĉar li scias ja.

— Johano, mi amas vin.

Liaj lipoj moviĝis. Maria klinis sin antaŭen. Neniu sono aŭdiĝis, sed ŝi komprenis lin.

Grimpante supren laŭ la ŝtuparo, Maria sentis grandan lacecon. Kutiman korpan lacecon ŝi spertis ĉiutage, sed ĉi tio estis alia laceco, kian ŝi sentis nur kelkajn fojojn en la vivo.

Sidante en la buso, veturante hejmen, Maria demandis sin, ĉu ŝi faris ion malbonan. Trapensante siajn kvindek kvin jarojn, ŝi ne trovis multon, pri kio ŝi devus honti. Nenion tre eksterordinaran ŝi faris en la vivo, sed ŝi ĉiam faris siajn devojn, preskaŭ ĉiam. Ial ŝi ekpensis pri siaj ferioj kun Johano. Ili feris ja nur unufoje, ĉar tuj post la mielmonato ili akiris sian etan bienon. Kelkaj riĉaj bienistoj havis dungitojn kaj feris ĉiusomere, sed tio ne eblis por ili. Iam dum la sesdekaj jaroj ili esperis pri tio. Ili revis ankaŭ pri komforta emeritiĝo. Sed poste tiuj grandaj vendejoj tiel premeĝis la prezojn, ke ili apenaŭ povis eĉ nutri sian kreskantantan familion. Sed ŝi ne plendas, ne rajtas plendi. Sep infanojn ŝi naskis, kaj ili ĉiuj estas sanaj, dank’ al Dio. Ĉiam ŝi laboris. Neniam ŝi plendis. Sed nun, tamen, ŝi tiom volus ripozi finfine. Eble baldaŭ, kiam Petro ne plu irados en la lernejon. Se li trovos laboron kaj povos prizorgi sin mem, tiam ŝi ne plu havos devojn. Eble tiam.

Nutrinte la bovinojn kaj farinte la aliajn eksterdomajn taskojn, ŝi laboris plejparte en la kuirejo. La tutan vesperon ŝi gvatis la aparaton en la angulo. Kiam fine ĝi eksonis, dum ŝi purigis la bretojn kaj aranĝis ĉion por la nokto, ŝi tamen sentis surprizon. Povus esti iu ajn, sed la telefono malofte eksonis ĉe ŝi. Ŝi jam sciis, kion oni anoncos al ŝi, sed ŝi devis aŭdi ĝin por esti certa. Ŝi ne volis aŭdi la vortojn, sed ŝi sciis, ke necesas.

Tiunokte ŝi preĝos por lia animo, kaj eble, se ŝi rajtas peti tion, ke ŝi povu sekvi lin post ne tro longa tempo.

Pro la novelo *Dank’ al Dio* Edmund Grimley Evans iĝis laŭreato de [Liro-2010](#) en la branĉo *Originala prozo*.



Internacia konkurso “Ĥristo Gorov – Ĥrima”

Ĥristo Gorov – Ĥrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj: verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Li verkis plurajn librojn, kiuj respegulas la pozitivajn homajn trajtojn: la solidarecon, la batalon por la bono, la strebon por honesta vivo.

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos je ĉiuj tri jaroj. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havos la jenajn branĉojn: poezio, prozo, artikolo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkita en Esperanto kaj per unu novelo ĝis 4-paĝa, originale verkita en Esperanto.

La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo.

La poemoj, noveloj kaj la artikoloj devas esti komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

La gajnintoj ricevos grandajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis 1 sep 2012 rete (modest@abv.bg) aŭ poŝte (Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Nadeĵda” V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario).

La rezultoj estos anoncigitaj en oktobro 2012.

Fest-libro por Claude Gacond

Svisa Esperanto-Societo kunlabore kun Edition Iltis preparas fest-libron por la ĉi-aŭgusta 80-jariĝo de la konata svisa pedagogo, arkivisto kaj redaktoro Claude Gacond. La titolo de la verko estas *Instrui dokumenti organizi* kaj aludas al la ĉefaj aktivecoj de la jubileulo. Al la libro kontribuos dudeko da gekolegoj kun temoj rilataj al la titola kadro.

Antaŭmendantoj de la verko ĝuos rabaton de 10 % por 1–2 ekz., de 33 % ekde 3 ekz. Oni sin turnu al la eldonejo ĉe kiu eblas enskribiĝi ankaŭ por figuri en la listo de gratulantoj (Tabula Gratulatoria):

✉ Edition Iltis, La Saousse, F-84340 Malaucène

✉ iltisedition@aol.com

Rustam Karapetjan

* * *

Virino staras ĉe fenestro,

Virino flustras ies nomon.

Laŭ strato marŝas blov-orkestro,

Muziko eĥas inter domoj.

Soldatoj marŝas laŭ la strato,

Kisetas ilin varma vento.

Foriras al milit’ soldatoj

Por ke reveni kun la venko.

Sed kiu post batal’ revenos

Nur scias la Ĉielpatrono

Kaj la virino, kiu pene

En preĝo flustras ies nomon.

Pro ĉi tiu poemo Rustam Karapetjan ricevis laŭdan mencion en [Liro-2010](#) en la branĉo *Originala poezio*.



Poemoj de Aleksej K. Tolstoj

Grafo **Aleksėj Konstantinovič Tolstój** (1817–1875), filo de grafo Konstantin Tolstoj (kaj duagrada kuzo de Lev Tolstoj) kaj Anna Perovskaja, post frua disiĝo de la gepatroj estis edukata de sia onklo Aleksej Perovskij (kiu verkadis kiel Anton Pogoreljskij), frue mergiĝis en la mondumon, infanaĝe amikiĝis kun la estonta imperiestro Aleksandro II, en la 18-jara aĝo eltenis universitatan ekzamenon kiel diplomato, okupis gravajn ŝtatajn postenojn en diversaj sferoj, ekŝiĝis en 1861. Li ekverkis frue, unue versaĵojn, gotikajn kaj fantastajn novelojn, sed famigis lin verkoj historiaj: romano *Princo Serebrjanyj* (1861; Esperanto-traduko de Ŝidlovskaja, 1912), drama trilogio *Morto de Ivano la Terura* (1866), *Caro Teodoro Ioannovič* (1868), *Caro Boriso* (1870). Li verkis baladojn, russtilajn “bylinoj”, kaj lirikajn poemojn, el kiuj pluraj iĝis ŝatataj romanoj muzikigitaj de Musorgskij, Ĉajkovskij, Rimskij-Korsakov, Raĥmaninov k.a. En ombro de lia drama kaj lirika verkaro restas liaj satiroj kaj humuraĵoj. Unu el ili ni proponas ĉi-paĝe.

AIKO

Saĝo de l' vivo

1
Se vin logas rang' majora,
Do ne servu en senat';
Alikaze – spron' sonora
Estu ekster via ŝat'.

2
Kontentiĝu per modero,
Bridu tentojn de malspar':
Manojn lavu, laŭ prefero,
Sed piedojn – vana far'.

3
Estu firma en principo,
Cedu en malgrava dir',
Fortojn streĉu en konstipo,
Lasu lakson sen retir'.

4
Se ŝiriĝis pantalonu
Aŭ malpuras ĝi pro ber' –
Ne demetu en salono,
Sed foriru al kamer'.

5
Se kvieton ĉambran iu
Rompos per nevola son',
Ne eksaltu kaj ne krii:
“Multajn jarojn! Dia don'!”

6
Ne mallaŭdu fremdan supon,
Dignu ĉe festena tabl',
De najbar' ne tiru stupon
El orelo, sen afabl'.

7
De la najbarin' ravito,
Vi ne palpu ŝin je mam';
Por viŝad' de frunta ŝvito
Ne uzeblu tuk' de l' dam'.

8
Se de l' tablo laŭbezone
Por minut' foriros vi,
Do al damoj fanfarone
Ne menciuj tion ĉi.

9
Ne riproĉu, se inteste
Ekmalsanis la najbar',
Sed provizu senmolesto
Lin per Korŝa foliar'.

10
Studu l' estran parencaron,
Distru ĝin laŭ ties plaĉ',
Tamen la familiaron
Ne transformu al mokaĉ':

11
Bopatrinon vi ne petu
Pri viŝtuk' por boto-par',
Kun avino ne ŝercetu,
Ĉu sufiĉas la dentar'.

12
De onklin' nomtagon konu,
Laŭdu ĉaston de kuzin'
Kaj senkaŭze ne friponu
Subaksele tikli ŝin.

13
Kun bofilinar' sen ĝeno
Agu, sed laŭ etiket':
Vermojn dum arbar-promeno
Ne enmetu al korset'.

14
En arbustojn vi ne logu
La filinojn por duvort'
Kaj detiri ne arogu
Ŝtrumpojn de l' nevin' per fort'.

15
Se vin vidas homoj – penu
Ne kriaĉi: “Fek! Latrin'!”
Kaj de bebo ne forprenu
Mamon de la nutristin'.

16
Por fraŭlinoj, komplezema,
Pluku fruktojn en ĝarden',
Pugon sen bezon' ekstrema
Ne elmontru jen kaj jen.

17
Dum somerumad' en ruro
Gvidu ilin al stalej':
Tio sciojn pri naturo
Helpas ampleksigi plej;

18
Sed, se volas vi mirigi
Ilin per surpriza trov',
Ne aŭdacu fi-instigi
Al melkado de virbov'.

19
Same fie estus ŝovi
Fingron al la pugna fask'
Kun pretekst', ke solvon trovi
Indas por enigma task'.

20
Ĝenerale, ŝercu milde,
Estu digna en kondukt',
Memorante pri ĝentil' de
Oficiro, laŭ statut'.

21
Se ĉe l' estro dignoplenu
Mortos ia parencin' –
Vi per anekdot' konvena
Kun suspir' amuzu lin.

22
Tamen zorgu, estu deca.
Ne rakontu por konfuz',
Ke jen ĉevalin' bonspeca
Ĉe vi same mortis jus.

23
Ankaŭ ne, ke sendomaĝe
Ni ne vivas sur la ter',
Kaj ke agas hom' malsaĝe,
Se bedaŭras pri l' afer'.

24
Ĉar se ardas senkompatu
Via estro en koler',
Vin forsendi piedbate
Povos lia kurier'.

25
Vi ne ĵetu, amosenta,
Perlojn al la porka greg' –
Post plugisto diligenta
Iras lerta frugileg'.

<1870>

Tradukis el la rusa lingvo
Valentin Melnikov

Pri niaj tradukoj

Antaŭ unu monato en *La Ondo* aperis la [tradicia statistika revuo](#) pri Esperanto-libroproduktado. Nun sekvas ĝia fina parto — pri libroj tradukitaj en Esperanton. Memorigeto: la bazo de la statistiko estas la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto*, kiu listas ĉiujn librojn, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la koncerna jaro.

Preskaŭ triono de nia libraro

La paĝosuba tabelo montras, ke en 2010 surmerkatigis almenaŭ 81 libroj tradukitaj en Esperanton — 39,7% de la entute 204 “laste aperintaj” libroj. Ĉar la jar-nombroj forte fluktuas (de 32 tradukoj en 2002 ĝis 94 en 2000), estas utile koni la averaĝon por la dudekjara periodo 1991–2010. Dum tiu tempo aperis entute 4020 libroj en/pri Esperanto, inter kiuj 1246 libroj tradukitaj en Esperanton — 31% de la tuta libro-produktaĵo en Esperantujo. Preskaŭ triono.

Ĉu 31% estas multe aŭ malmulte? Ni komparu.

En Ruslando ĉi tiu procentaĵo estas malpli granda — en 2009 inter la 127.596 eldonitaj libroj estis 14.078 tradukoj (11%).

Laŭ informoj de Jukka Pietiläinen, la proporcio de la tradukoj inter la libroj eldonitaj en Finnlando varias lastatempe inter 15% kaj 25%; en 2005 ĝi estis ĉ. 17%. Lu Wunsch-Rolshoven informis, ke en Germanio en 2009 aperis 11.800 tradukitaj libroj (12,7%), kaj en Francio 9088 (14,3%), dum en Britio nur 2% de la eldonitaj libroj estis tradukoj.

Lu Wunsch-Rolshoven trovis konstaton, ke en malpli grandaj lingvoj (ekzemple, en la nederlanda kaj en la hungara) la procentaĵo de tradukoj varias inter 20% ĝis 60% — do Esperanto estas inter tiuj lingvoj.

La angla estas la plej populara en la mondo

La datumaro *Index Translationum* de Unesko, registras ĉirkaŭ 2 milionoj da tradukoj aperintaj post 1979. Ĉi tiu indekso (nekompleta) enhavas ankaŭ la liston de la fontolingvoj, el kiuj oni tradukis. Plej supre en ĉi tiu listo estas la angla lingvo, el kiu oni tradukis ĉirkaŭ duonon da libroj. Jen la unua deko da plej popularaj fontolingvoj:

Angla 1.032.456
 Franca 189.064
 Germana. 172.940

Rusa 94.714
 Itala 56.368
 Hispana 43.883
 Sveda 31.358
 Latina 16.831
 Dana 16.694
 Nederlanda 16.350

La angla kiel la fontolingvo dominas. Ekzemple, en Germanio en 2008 du trionoj de la tradukoj (66,9%) venis el la angla, kaj 11,5 % el la franca. En Francio en 2009 aperis 5.638 tradukitaj libroj el la angla (62%), 751 el la japana (8,26%), kaj 566 el la germana (6,23%).

En Finnlando en 2005 aperis 2235 tradukoj al la finna, inter kiuj 1331 libroj (59,6%) el la angla, 369 (16,5%) el la skandinavaj lingvoj (plejparte, el la sveda), kaj 535 (23,9%) el aliaj lingvoj. La proporcio de la angla inter la tradukoj en la finnan fluktuas de jaro al jaro: 53% en 1938, 46,6% en 1980, 68% en 2000, 59,6% en 2005, kaj 61,8% en 2006.

... sed ne en Esperantujo

Sed Esperantujo mankas sur la mondmapo, kaj oni tradukas en Esperanton el la angla nek la modernajn romanojn, nek librojn sciencajn kaj teknikajn. Ne pli ol 50%, sed nur 7,4% de nia tradukita libraro (6 libroj) fontis el la angla, multe malpli ol la tradukoj el la franca (21 libroj / 26%) kaj el la germana (18 libroj / 22%).

La resuma statistika tabelo por 1991–2010 montras proksimuman egalecon inter la tradukoj el la franca (12,5%), germana (11,6%) kaj angla (11,5%). Sur la naŭa loko en la pinta lingvodeko ankoraŭ restas la jida lingvo pro pli ol 40 kelkpaĝaj broŝuretoj de Iĉĥok Lejbuŝ Perc, tradukitaj kaj eldonitaj de Tomasz Chmielik en 1993, kaj registritaj en *Laste aperis* en 2000 kaj 2001.

Krom tradukoj en Esperanton, dum la lastaj 20 jaroj aperis 113 tradukoj el Esperanto alilingven. Plejparte temas pri naci-lingvaj versioj de internaciaj lernolibroj kaj informlibr(et)oj pri Esperanto (ekzemple, pli ol 20 diverslingvaj tradukoj de la rekt-metoda lernolibro de Stano Marček, eldonitaj plejparte de la aŭtoro mem kun la samaj bildoj).

Ĝis venontaj statistikoj!

Aleksander Korĵenkov

Lingvo	1991	92	93	94	95	96	97	98	99	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	2010	Sume
Franca	5	7	9	5	6	6	15	11	7	10	3	2	6	2	7	6	9	6	13	21	156
Germana	7	6	4	5	2	7	2	7	6	7	8	3	8	4	9	7	7	11	16	18	144
Angla	5	4	6	8	10	6	10	6	5	7	11	3	8	24	6	6	6	3	3	6	143
Rusa	5	5	2	1	1	1	3	6	1	7	4	4	5	6	5	4	8	2	2	4	76
Pola	2	0	0	2	0	3	10	1	4	6	11	1	1	1	0	6	0	0	4	3	55
Ĉina	7	7	2	0	3	5	3	4	2	3	2	1	1	3	0	0	1	1	4	1	50
Portugala	3	2	1	2	3	4	9	5	3	2	2	3	3	0	1	1	4	2	0	0	50
Japana	2	3	2	1	2	5	4	1	1	2	1	3	3	3	2	2	5	4	1	1	48
Jida	0	0	0	0	0	0	0	0	0	25	19	0	0	0	0	0	0	1	0	0	45
Itala	1	0	1	1	2	2	3	2	6	0	2	0	5	1	0	6	3	2	1	5	43
Entute	61	54	40	56	46	69	85	73	67	94	82	32	67	64	45	60	59	56	55	81	1246
Eo	2	2	3	3	2	2	2	3	3	4	7	3	8	6	10	6	13	12	8	14	113

Libro vere bonega

Rak, Pavel. *Kreslený humor = Desegnita humuro = Cartoon humour = Humor mit dem Zeichenstift.* — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. — 128 p., il.

Ekzistas arto teksta, sona kaj bilda. Kutime por ĉiu homo plej bone percepteblas unu el tiuj tri specoj, kaj ĝuste tiun specon li kapablas taksu. Mia medio estas tekstoj — do, mi ne provas recenzi sondiskojn, ĉar ne estas kompetenta pri muziko...

Kaj nun necesas recenzi arton bildan — eble unika okazo. Temas pri *Desegnita humuro* de Pavel Rak, probable la plej konata pentristo en Esperanto-medio. Liajn bildojn ĉiuj legantoj vidis en *Juna amiko, Esperantisto Slovaka* kaj aliaj revuoj; same en ĉiuj libroj de la eldonejo KAVA-PECH, produktinta tiun ĉi libreton. Lia stilo tuj rekoneblas.

La antaŭparolo kaj la titoloj de la bildoj aperas en kvar lingvoj: ĉeĥa, Esperanto, angla kaj germana. Diverslingvaj tekstoj ne ĉiam estas plene identaj, fojfoje estas interese kompari. Kelkfoje teksto estas parto de la bildo mem — do laŭ tio eblas konjekti, en kiulingva eldonaĵo la bildo aperis unue. Kelkaj bildoj eĉ tute ne bezonas vortajn klarigojn.

La libro konsistas el temaj ĉapitroj: Geedzoj — familio, Erotiko, Ĉe l' kuracisto, Filozofiaj vidpunktoj, Ekologio, Diversaĵoj, Kontraŭ milito; en la lasta parto estas kolektitaj specimene ilustraĵoj por diversaj eldonaĵoj de KAVA-PECH. Estas ridigaj, jen paradoksaj, kaj samtempe pensigaj karikaturaj — kaj samlibre ravigaj mildaj erotikaj. Tra la bildoj senteblas bonkoreco de la pentristo kaj lia amo al la vivo...

Libro vere bonega, unika kaj ĉiel rekomendinda. Sufiĉas iom scii unu el la kvar uzitaj lingvoj, kaj vi povos ĝui ĝin.

Valentin Melnikov



Eble ili nur ŝajnas feliĉon, por inciti nian galon.

Perhaps they're only making out they're happy just to annoy us!

Sie tun vielleicht nur so, als ob sie glücklich sind, um uns zu ärgern.

Esperanto en Sarlando

Esperanto en Sarlando. De la komencoj ĝis 1988: [Kolekto de studoj] / Hauptenthal R., Meyer E., Omlor A., Schenkel J. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2010. — 64 p.

La recenzata kolekto prezentas pli ol 80-jaran historion de Esperanto en la regiono kun eksterordinara sorto: post la unua mondmilito Sarlando troviĝis sub direktado de Ligo de Nacioj, post la plebiscito ĝi re-aligis al Germana Regno (1935), estis aparta ŝtato post la dua mondmilito, kaj post plebiscito de 1955 iĝis unu el la landoj de FRG.

Ĉi tiu libro, ekkompilita en la 1980aj jaroj, longe prokrastiĝis. Reinhard Hauptenthal editoris kaj kompletigis ĝin, provizante ankaŭ per piednotoj, apendicoj kaj bibliografio.

La unua materialo estas resuma skizo de Ernst Meyer *La komencoj de Esperanto en Sarlando*. Oni ne havas dokumentitajn informojn pri Esperanto en Sarlando antaŭ 1910. Supozeble la instruisto Fasbender estis la plej malnova esperantisto en Sarlando. En decembro 1910 li varbis por instruista kurso. Kursanoj el St. Ingbert partoprenis en la unua Esperanto-grupo. Propagando, instruado kaj korespondado estis la tiutempa agado.

La studo de August Omlor *Esperanto en la Saar-teritorio* pli detale prezentas la fruan epokon. Estas citataj artikoloj el *Germana Esperantisto*, kiuj donas imagon pri la propaganda kaj instrua agado en Saarbrücken kaj St. Ingbert. La poŝkalendaro de 1911 citas por Saarbrücken societeton esperantistan. Kiel ekzemplo de la agado estas represita programo de Esperanto-festo, kiu okazis 16 sep 1911 kun paroladoj, muziko, recitadoj, kantoj kaj balo. La artikolon ilustras fotokopio de la poŝtkarto adresita al Omlor de Edmond Privat, konfirmanta sukceson en la skriba ekzameno el la jaro 1911.

Jakob Schenkel en *Esperanto en la Saarregiono (1910–1961)* kompletigas la du antaŭajn studojn, bazante sin sur la aktoj de Omlor, la protokollibroj de Esperanto-Ligo Saarteritoria (1923–1927), artikoloj el germanaj ĵurnaloj kaj raportoj el Esperantaj gazetoj, asociaj informiloj kaj cirkuleroj.

Lia studo dividiĝas je ĉapitroj. En *Antaŭ kaj dum la unua mondmilito* li skribas pri ekesto de Esperanto-aktivajoj en kvar lokoj sendependaj unu de la aliaj. La faktojn li prezentas kronologie.

Interesa epizodo estas ligita kun Schenkel mem kiel soldato, kiu en marto 1916 venis al Łódź, kie li havis kontakton kun la loka Esperanto-grupo kaj kun Antoni Grabowski.

La dua ĉapitro, *Inter la du mondmilitoj*, konstatas individuan laboron ekde 1920 kaj reaktiviĝon en 1923 per preparkunveno por Esperanto-Ligo Saarteritoria, kiu organizis kunvenojn, amuzajn aranĝojn, kaj ekskursojn, varbadon, instruadon, kunlaboron kun Saar-Radio-Club. La lastaj aktivajoj antaŭ la granda silento estis ekskurso al Landstaul en aprilo 1931 por renkontiĝi kun la tieaj esperantistoj, parolado en Saarbrücken en oktobro 1932 kaj artikoloj en la nacilingva gazeto ĝis la jaro 1935.

La ĉapitro *Post la dua mondmilito* notas kiel signon de la renaskiĝo la artikolon de Omlor en 1947, poste lian varbparoladon en januaro 1949 en popolaltlernejo kaj kurson tiam komenciĝintan. Sarlanda Esperanto-Asocio (ekde 1959: Ligo) fondiĝis en februaro 1951. Granda evento por la sarlandaj esperantistoj estis la 14a kongreso de TEJO en Homburg en 1958. Okaze de la kongreso la urboj Saarbrücken kaj Homburg eldonis prospektojn en Esperanto.

Fine Reinhard Hauptenthal, la kompilinto de la libro, priskribas la agadon dum 1962–1988 laŭ la periodoj de endormiĝo (1962–1973) kaj revigliĝo (1973–1988). En la dua periodo aperis *Dialogo*, la organo de SEL, kiu detale registris ĉiujn aktivajojn, tial la aŭtoro nur mallonge resumas la aktivadon. Kiel kulmino de la asocia agado estis 31 Kulturaj Semajnfinoj kun kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kaj kun esperantologiaj seminarioj. Inter la prelegantoj estis vere elstaraj personoj. Ĝuste per sia kultura aktivado (kulturaj semajnfinoj, periodaĵo, libro-servo) SEL iĝis konata internacie. Sekvas detaloj pri la krizo en la estraro de SEL en 1988/89 el la aŭtoro vidpunkto. La posta agado de SEL ne estas prezentita.

Valoraj apendicoj aperas librofine, en la sesa sekcio:

6.1. Esperanto-libroj aperintaj en Sarlando;

6.2. La estraranoj de SEL (1951–1988);

6.3. La Kulturaj Semajnfinoj de SEL (1973–1988);

6.4. Fontoj uzitaj.

La sepa parto estas bibliografio.

Halina Gorecka

Avanulo en lingvoinstruado

Forsman, Lars. *Esperanto ... över 50 miljoner träffar*. — Karlskoga: Lars Forsman, 2010. — 135 p., il.

La konata kaj sperta lingvoinstruisto (angla, germana, Esperanto) Lars Forsman en Karlskoga Popola Altlernejo publikigis en septembro 2010 fascinan verkon *Esperanto ... över 50 miljoner träffar*, kiu tre multflanke kaj ĉarme prezentas svede la Internacian Lingvon kreitan de d-ro Ludoviko Zamenhof en 1887.

La verko baziĝas sur propraj, praktikaj spertoj de la aŭtoro. Li profunde konas la temon. Ĝuste lia persona prezentmaniero faras la libron tre alloga. Leganto ne emas lasi la talentan akompanion de Lars Forsman, kiu vokas al vigla kaj verva rakontado pri la lingvo mem, ĝia instruado kaj utiligado en tutmondaj kadroj.

Scivolemuloj de nia tempo ne facile trovas fidindan gvidilon pri Esperanto. Jen ni havas modelan fonton, kiu malfermas senliman agadteron, kapteblan kaj kompreneblan por kiu ajn. Tiuj, kiuj ne kapblas legi svedajn tekstojn, jam dum foliumado komencas envii svedlingvanojn pro la riĉaj ilustraĵoj, kiuj bele spicas la enhavon de la verko.

Lars Forsman enkondukas la temon rakontante, kiel li mem trovis la lingvon Esperanto. Li menciis fortajn antaŭjuĝojn, kiuj katenas kaj bremsas liberan, entuziasman scivolemon. Ofte la vojo al Esperanto ne estas pavimita, sed surhavas multajn obstaklojn kaj malhelpojn precipe en formo de antaŭjuĝoj. Etaj, signifaj detaloj kaptas la atenton de la leganto, kiu sekvas la aventurojn de gestudentoj en Karlskoga. Tuj de la komenco internacieco stampas la agadon, ĉar la gelernantoj apartenas al multaj diversaj nacioj. Esperanto estas taŭga ilo por instrui la lingvon mem. Specialan metodon tiucele elpensis la hungaro Andreo Cseh, al kies skolo aliĝis ankaŭ ĉiuj novaj adeptoj en Karlskoga.

En Karlskoga Popola Altlernejo dum 15 jaroj studis Esperanton lernantoj el ĉirkaŭ 40 landoj. Multaj konataj lingvopedagogoj kaj fakuloj de la lingvo Esperanto vizitis ĝin. Tute novajn eblecojn por studi donis la Interreto. Kursanoj ekkonis mirindajn dimensiojn ĉe siaj komputiloj. Malfermiĝis tre alloga mondo ĉe universitatoj, kiuj instruas la Internacian Lingvon. Tutmonda literatura mozaiko de Esperanto estas

kolora kaj multflanka. Diktatoroj, kiel Stalin kaj Hitler, klopodis forigi Esperanton el la surfaco de nia tergloba, sed — fiaskis ilia entrepreno.

Tre feliĉa mi estas pro tio, ke mi kapblas legi kaj kompreni la svedan lingvon. Niaj najbaroj en Svedio kaj svedeparolantoj en Finnlando estu tre kontentaj, ke oni havas tiel informriĉan libron pri Esperanto. Ne hezitu, legu ĝin — vi surpriziĝos. Forpuŝu viajn eventualajn antaŭjuĝojn kaj aventuru kune kun Lars Forsman. Vi ne pentos pri via restado sub vespera legolampo kun la profesia gvidanto el Karlskoga.

Jorma Ahomäki



La trajno misdirektita

Dolchamar. *Trajn' nenien*: KD. — Donnevill: Vinilkosmo, 2010.

Post la iom eksperimenta kaj “kosma” albumo *Lingvo Intermonda*, post la vere potenca kaj skua *Rebela Sono* jen nova disko de la finnlanda bando *Dolchamar* kun iom filozofia nomo *Trajn' nenien*. Notindas, ke la nomo rezultis ne nur filozofia, sed ankaŭ iusence (mis)aŭgura.

La domina stilo de la bando ĉi-albume iom kvietiĝis kaj, mi diru, “normaliĝis”, tiel ke rezulte ni havas pli-malpli popular-muzikan kolekton (kvankam kun disaj elementoj de skao, elektronika danc-muziko kaj eĉ kun iom da orienta aromo) — do, nek vere hiphopan, nek vere rokecan. La harmonioj kaj la muzika enhavo ĝenerale estas relative simplaj, kvankam la muzik-aranĝoj restas same variaj kaj eĉ iom pli vivaj. Jes ja, la sono entute estas plaĉa, sed kompare al la antaŭaj albumoj la bando perdis multe da originaleco kaj propra stilo — la albumo kiel tuto rezultis iom sensuka kaj grizeta. Eble oni povas paroli pri la serĉo/trovo de la nova stilo, sed en tiu nova rolo *Dolchamar* por mi persone aspektas malpli alloga kaj ekscita.

La tekstoj neniel riparas la situacion pri perdo de la “vizaĝo” de la bando. Kvankam ili temas pri tiel fekunda temaro kiel meditoj pri la vivo, pri la destino, pri la mond-percepto, foje ankaŭ pri la amrilatoj aŭ eĉ pri esperantumado, al ili mankas beleco, iu specifa “animo” aŭ klare pripensita mesaĝo. Preskaŭ ĉiuj tekstoj estas en la bona okazo nebulaj kaj abstraktaj, en la malbona okazo — terure naivaj. Kompense ili riĉas je iom riskaj formoj kaj malklaraj metaforoj. La poezian impotentcon de la albumo substrekas la fakto, ke en multaj kantoj la strofoj ripetiĝas parte aŭ plene (nur la voĉo de la kantisto estas ŝanĝata per diversaj komputilaj metodoj), dum unu komponaĵo prezentas eĉ tute senvortan kaj sufiĉe tedan klavopremadon.

Memkompreneble, tra ĉiuj kantoj hantas la fantomo de adasismoj kaj mislokigitaj akcentoj. La gramatiko kelkfoje lamas (“ĉu ni movas ien ajn?” anstataŭ la celita “moviĝas”, “krevita ŝuo”), ankaŭ la leksiko ie-tie prezentas iom kap-rompajn problemojn (ekzemple, mi certiĝis pri la senco de la vorto “frizuro” nur post la konsulto de mia franca-rusa vortaro). Malfeliĉe, eĉ la elparolo de la kantisto multloke estas netolereble senzorga: multaj konsonantoj estas “forglutitaj” aŭ kunpuŝiĝe misprononcitaj.

Tamen almenaŭ du komponaĵoj rimarkeble elstaras el la tuta albuma grizo. Temas pri la energie entuziasma *M.T.R.* (la frapaĵo “Ne haltu, motoro! Hot! Hoto! Motoro!” el tiu kanto havas multajn ŝancojn iĝi ne malpli populara, ol *Ĉu vi pretas?*, kiu sonis sur unu el la antaŭaj diskoj de la bando) kaj danciga *If*. La diskon garnas tekstolibreto, 11 mp3-dosieroj kun la karaokeraĵaj versioj de la kantoj kaj enuiga (supozeble — iom haste farita) muzikvideo por la kanto *Des pli*.

Resume, mi atendis pli da bonaj impresoj de tiu disko. Ne eblas scii, al kiu direkto oni esperis direkti la “trajnon”, sed la direkto evidente estis elektita iom mise. Escepte de du kantoj la disko neniel elstaras eĉ sur la Esperanta muzika tereno (por ne paroli jam pri sennombraj muzikaj grupoj diverslandaj); kaj fone de la antaŭaj kreaĵoj de la bando ĝi eĉ evidente palas. Jen sincera konsilo por la fino: se vi ankoraŭ ne estas konvinkita fano de la bando kaj volas nur konatiĝi kun ĝi, prefere komencu per la antaŭaj albumoj.

Paŭlo Mojajev

Esperanto-muziko: printempo kaj somero 2011

Esperanto Subgrunde renaskiĝas

11 jarojn post la apero de *Esperanto Subgrunde* restas nur kelkaj ekzempleroj de ĝi por kolektantoj. Reeldono estus tro komplika, ĉar temas pri kompilo, kaj pluraj bandoj ne plu ekzistas, do la du eldonejoj (*Vinilkosmo* kaj *La Blua Papiro*) kaj kelkaj muzikistoj el tiamaj bandoj interkonsentis disponigi libere virtualan version de la kompilo.

La ideo estas ankaŭ subteni novajn bandojn kun similaj projektoj, ekzemple, la ruslandajn bandojn ĉe la anarki-punkhardkora eldonejo "Hej Hula!", kaj samtempe ne perdi la ekzistantajn verkojn. Kune kun la 31 eroj de la malnova kompilo aperas 4 aldonaj trakoj kun titoloj samstilaj aperintaj en aliaj kompiloj.

La kompilo jam estas aŭskultata en la radio de la elŝutejo: http://cd1d.com/radio.php?release_group=149231

Ĝi ankaŭ libere elŝuteblas ĉe: <http://cd1d.com/fr/album/esperanto-subgrunde>

Turneo de Kapriol'!

EUROKKA starigis turneon de la frisa folka bando *Kapriol'!* dum aprilo. La turneo startos en Bruselo, iros suden al Le Mans, St-Brieuc, Libourne, Montgiscard/Donneville, Verniole ĝis Sète por IREM, reiros norden tra Crest, kaj finiĝos ĉe PSI en Germanio.

La turneo estas anoncita kiel bala turneo, kiu dancigos la publikon laŭ tradiciaj dancoj: skotiŝoj, polkoj, valsoj, mazurkoj, bureoj, androj; kaj ankaŭ rondancoj cerkloj kaj ĵigoj. Vidu pli:

<http://www.ipernity.com/blog/39007/249356>



Brassens en Esperanto, (de)nove

Post elĉerpiĝo de la unua albumeto de kantoj de Georges Brassens, kantitaj en Esperanto de Jacques Yvart, *Vinilkosmo* kaj Yvart decidis reeldoni ĝin kun aldono de sep pliaj kantoj, kaj proponi novan albumon kun kantoj reregistritaj, remiksitaj kaj remastrigitaj. La albumo *Brassens plu* aperos je Pasko 2011 okaze de IREM: Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo.

En IREM Jacques Yvart donos spektaklon en Esperanto pri Georges Brassens ĝuste en Sète, la urbo de Brassens, en la koncertejo *Georges Brassens*, kaj en la jubilea jaro de la naskiĝo kaj forpaso de Brassens... Tiu spektaklo estos grava evento por la urbo, kaj la nova albumo estos la ĉerizo sur la torto!

HHK2 en preparo

Tuj post la fulma sukceso de HHK1 (HipHopa Kompilo Vol. 1), kiu aperis subgrunde kaj preskaŭ kaŝe, estis lanĉita la ideo prepari duan volumon kiel oficialan eldonon ĉe *Vinilkosmo*... Ĝi alportos ampleksan palettron de Hiphopaj stiloj el plej diversaj artistoj el Kanado, Francio, Brazilo, Germanio, Finnlando, Japanio, Svedio, Danlando, Slovakio... plejparte jam konataj en Esperantujo.

HHK2 devus preti por la grandaj eventoj en Eŭropa somero IJK, SES, KEF, FESTO, UK...

Manüel: subtenenda projekto

La italo Emmanuele Rovere pretigas albumon memproduktitan, sed distributan de *Vinilkosmo*. Li lanĉis ĉi tiun projekton favore al asocio, kiu helpas afrikajn malsanajn infanojn. Subtenu la projekton, aĉetante la diskon. Kaj nun malkovru la artiston ĉe: <http://www.ipernity.com/home/166962>

Revado plene Esperanta

La milana folkprogresiva ĵazroka bando *Rêverie* (Revado) eldonos sian tutesperantan diskon ĉi-printempe.

La diskon produktos Anĉjo kaj distribuos *Vinilkosmo*. Ekzistos du versioj de la disko, la Esperanta kaj la itala. Ankoraŭ ne eblas scii, ĉu la du albumoj aperos aparte aŭ kiel duobla albumo.

Amindaj kubanoj

Dum la pasint-jaraj IJK kaj UK multaj enamiĝis al la kuba bando *Amindaj*. Tio kreis solidarecan monkolektadon por helpi la junan bandon registri siajn muzikojn. Nuntempe ili registras siajn kantojn, pecon post peco, en radiostudio por albumo, kiun eldonos *Vinilkosmo*, se la arta kaj teknika kvalito atingos akcepteblan nivelon.

Kajto Duope

Nun *Kajto* iĝis duopo — Nanne kaj Ankie. Ilia partopreno en FESTO pasint-somere revigligis ilin instige al eldono de Esperanto-albumo. La preparo jam ekis... oni ne scias kiom longe ĝi daŭros, kaj *Vinilkosmo* enretigas en sia elŝutejo ilian unuan albumon *Kajto* kaj la trian *Tohuvabohuo*, kies KDoj elĉerpiĝis: http://www.vinilkosmo-mp3.com/kajto-c-76_115.html?language=eo



Fotis Ivo Mtesen

Aŭskultu *Vinilkosmo*-radion

Kun la malfermo de spaco propra al *Vinilkosmo* ĉe cd1d (federacio de sendependaj eldonejoj) en la fino de 2010 tie ekfunkciis la retradio de *Vinilkosmo*.

La radio konsistas el elekto de albumoj, eldonitaj de *Vinilkosmo*. Je ĉiu nova ŝalto de la radio aperas hazarda elekto de muzikoj:

<http://esperanto-tv.com/vinilkosmo>

Aŭkultu, sed ne forgesu ke ĉiuj kantoj troveblas en la diskoj mendeblaj ĉe www.vinilkosmo.com.

Estas tre grave subteni la Esperanto-muzikon aĉetante la diskojn. Dankon!

Plej muzik-mojose incitis vin

Flo!

“La Ondo de Esperanto” en la jaro 2010

En la pasinta jaro *La Ondo de Esperanto* ricevis 509 abonkotizojn. Ĉi tiom estas je 34 kotizoj malpli ol en 2009, kaj je 64 kotizoj malpli ol en la rekorda jaro 2008. La abon-nombro refalis al la jaro 2003, kiam ĝi unufoje superis kvincenton, sed la laŭlanda strukturo nun estas alia ol antaŭ sep jaroj: intertempe la Ruslanda abonantaro malkreskis je 20, kaj la alilanda kreskis je 24.

	1998	99	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	2010
Ruslando	147	133	122	115	101	98	104	92	93	91	95	85	78
Aliaj landoj	136	170	238	257	305	407	421	450	452	448	478	458	431
Entute	283	303	360	372	406	505	525	542	545	539	573	543	509

La plej granda falo en 2010 okazis en Ruslando, Britio, Francio (-7) kaj en Usono (-5). La plej granda kresko estis en Belgio, Ĉeĥio, Finnlando kaj Hispanio (+3). *La Ondo* dum 2010 estis legata en 45 landoj, je 5 landoj malpli ol en 2009.

Jen landoj kun pli ol dek abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2009):

Ruslando	78 (85)	Italio	17 (21)
Pollando	58 (58)	Serbio	17 (18)
Germanio	35 (34)	Usono	17 (22)
Francio	34 (41)	Britio	16 (23)
Brazilo	27 (25)	Svedio	12 (16)
Finnlando	26 (23)	Ĉeĥio	11 (8)
Hispanio	25 (22)	Japanio	11 (10)
Belgio	18 (15)		

La malkresko de membroj kaj abonantoj karakterizas preskaŭ ĉiujn asociojn kaj gazetojn en Esperantujo. Laŭ la ricevataj abonlistoj ni vidas, ke la malkresko daŭras ankaŭ ĉi-jare en *La Ondo*. Ĉu ni sukcesos la naŭan sinsekvajn jaron havi pli ol 500 abonantojn? Ĉiu leganto povas helpi per reabono, informado en kluboj kaj renkontiĝoj, kaj per donaco al nia *Abonhelpa Fonduso*.

AIKO

Ricevitaj libroj

Bavant, Marc. *Matematika vortaro kaj oklingva terminaro*. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003. — 232 p. — [Donaco de KAVA-PECH].

Esperanto en Sarlando. De la komencoj ĝis 1988: [Kolekto de studoj] / Reinhard Hauptenthal, Ernst Meyer, August Omlor, Jakob Schenkel, Kompilis Reinhard Hauptenthal. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 64 pĝ. — (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik; Heft 16). — [Recenzoekzemplero].

Forsman, Lars. *Esperanto ... över 50 miljoner träffar*: [Informlibro pri Esperanto en la sveda]. — Karlskoga: Lars Forsman, 2010. — 135 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Kašparů, Max. *Kristmaskaj demandoj kaj paradoksoj* / Tradukis el la ĉeĥa Marek Blahuš. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2010. — 20 p. — [Donaco de KAVA-PECH].

Rak, Pavel. *Kreslený humor = Desegnita humuro = Cartoon humour = Humor mit dem Zeichenstift*. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. — 128 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Werner, Jan. *Terminologiaj konsideroj*. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. — 180 p. — [Donaco de KAVA-PECH].

Ricevitaj gazetoj

Beograda Verda Stelo, 2010/3; EAB Update, 2011/52; Esperanto en Azio, 2011/72; Esperanto sub la Suda Kruco, 2011/104; Esperanto, 2011/2; Femina, 2010/24; Heroldo de Esperanto, 2010/15,16; Internaciisto, 2011/1; KAE-Infomilo, 2011/73; Kontakto, 2010/5-6; La Gazeto, 2011/151; La Lanterno Azia, 2010/12; La Movado, 2010/717,718; La Ondo de Esperanto, 2011/2; La Revuo Orienta, 2010/11; La Sago, 2010/68; Literatura Foiro, 2010/248; Lumo, 2010/2; Monato, 2011/1; Scienco kaj Kulturo, 2010/6; Verda Triangulo, 2011/6.

Literatura Foiro, 2010, №248

(HeKo) La 248a numero fermis la 41an jarkolekton de *Literatura Foiro* — Kelkaj frazoj el la parolado dum la sesa UK en Vaŝingtono antaŭ cent jaroj rememorigas, kion pensis la Majstro pri “la sole ebla natura irado de la aferoj”.

La libro *Vizaĝoj* estas unu el la akcentoj en la numero. Carlo Minnaja retrospektive serĉas la daŭrigon de la tradicio, Till Dahlenburg analizas verkojn el la libro, kiuj donas kontribuon al la vizaĝo de la nuna esperanta beletro.

La originala literaturo ĉeestas per poemo de Benoît Philippe, hajkoj de Lilia Nikolova, kaj rakonto de Steven Brewer.

Literaturo de diasporo: ĉu ankaŭ literaturo por paco — la kazo de la esperanta literaturo estas la eseo de Giorgio Silfer. Perla Martinelli meditas pri la tradukitaj libroj, kiuj nepras en niaj librokolektoj. En aliaj rubrikoj: satiro de la albana klasikulo Ismail Kadare kaj poemo de la moldava reĝisoro Emil Loteanu. Carlo Minnaja konatigas la legantojn kun la plej freŝa romano de Umberto Eco *La tombejo de Prago*. Marie France Conde-Rey prezentas la ĉi-jaran Goncourt-premion, asignitan al la romano *La mapo kaj la teritorio* de Michel Houellebecq.

Socio: gastas la fama portugala verkistino Teresa Salema per traduko de Donald Broadribb. Leen Deij rakontas pri la esprimlibero en Nederlando. Armando Zecchin esploras la vortojn de Sankta Paŭlo: “Pagu la impostojn!”

La sepa arto ĉeestas per recenzo de Giorgio Silfer pri la filmo *Libereco* de Tony Gatlif. *La barilo: skizo por dramo* de Radoslaw Nowakowski aperas en la rubriko *Skerco*. La kultura agendo de Ljubomir Trifončovski estas dediĉita al la dancarto.

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la januara *Sudoku* venis 23 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Karine Arakeljan, Arayik Mnatsakanyan (Armenio), Anne George, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Jindřich Tomášek, Marek Blahuš (Ĉeĥio), Erkki Kempainen, Asko Kytä, Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Guy Tatet (Francio), Nora Caragea, Edeltraut

8	6	1	5	2	4	7	9	3
7	4	9	1	6	3	2	5	8
3	5	2	7	9	8	1	4	6
5	9	6	2	4	1	8	3	7
2	8	4	3	7	9	6	1	5
1	3	7	8	5	6	9	2	4
6	1	5	9	3	7	4	8	2
9	7	3	4	8	2	5	6	1
4	2	8	6	1	5	3	7	9

Henning (Germanio), Edith Schönwälder (Hispanio), Gianfranco Vignando (Italio), Martí Guerrero (Katalunio), Hanna Skalska, Mirosława Kubicka, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Luís Filipe P Ladeira (Portugalio), Svetlana Ŝevjakova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La loto donis libropremion al *Asko Kytä*. Gratulon!

Proverboj trovendaj

Necesas solvi la enigmon de nekonata skribaĵo. En la sekva teksto kaŝiĝas du proverboj el la Proverbaro Esperanta de L. L. Zamenhof. Ĉiu simbolo/signo prezentas literon, samaj simboloj do estas samaj literoj. Ofte uzataj simboloj kaj mallongaj vortoj eble helpas al vi trovi la “ŝlosilon” por la solvo.

La respondoj devas veni al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de aprilo 2011.

Havu multe da plezuro!

Nora Caragea

★☺ ⓂⓈⓉⓊⓋ ☺★ ⓂⓈ★Ⓣ□,
 ★☺ Ⓢ♥ⓈⓈ★ⓈⓉⓊⓋ ★] [★Ⓣ□.
]★ ⓂⓈ Ⓢ♥ⓈⓉⓊⓋ
 ⓂⓈ☺ Ⓢ♥ⓈⓈ,
 Ⓢ♥ Ⓢ□[ⓈⓈⓈ ⓂⓈ☺ Ⓢ♥☺ⓈⓉⓊⓋ].

Juda humuro

La plej malbona tago de mia vivo

Ŝmuel sidis vespere en drinkejo longe rigardante sian plenan bierglason. Tiam pasis grandega bubviro, kiu subite prenis la glason de Ŝmuel, eltrinkis ĝin kaj komencis ridegi.

Ŝmuel komencis plori laŭte.

— Kio okazas al vi, ulo, — demandis la grandegulo, — mi nur iom ŝercis.

— Vi eĉ ne povas imagi al vi kiom teruran tagon mi havis. — Ŝmuel respondis. — Matene mia estro sciigis, ke li maldungas min. Mi kuris hejmen kaj trovis tie mian edzinon kun mia plej bona amiko. Mi eliris kaj trovis, ke oni ŝtelis mian aŭton, en kiu estis la monujo kaj ĉiuj miaj dokumentoj. La plej terura tago en mia vivo! Mi decidis memmortigi. Mi aĉetis venenon, venis ĉi tien, metis la venenon en la bieron kaj intencis baldaŭ trinki ĝin, sed tiam vi venis kaj trinkis ĝin. Nu, sufiĉe pri mi. Rakontu vi: kiel pasis via tago.

El la kolekto de Josef Ŝemer

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraraj

el la kolekto de reduktoro

Bildoj ne plu frenezaj

Antaŭ ol meti la tradukaĵon en Interreto mi ŝanĝas demencion de bildoj en la libreto por ke ĉio bonege aspektu. (*Ukraina Ligo de Esperantista Junularo: 200 la plej gravaj vortoj*, ulej.retejo.net/tradukindajxoj/200-la-plej-gravaj-vortoj)

Ekzemplu duop' aristokrata

Specimena Pargrafo (Roedy Green. *Esperanta prononco*, mindprod.com/esperanto/esounds.html)

Ĉu ĉe nunaj rentoj indas?

... ilia laboro estis kvazaŭ ambasadoro de pola kulturo, de Esperanto. Mi ne kredas, ke iu kiu tion decidis faris senintereze. (Stanislaw Rynduch. *La faktoj sur tablono*, liberafolio.Org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio#1296755241, 3 feb 2011)

Ne muziku sen kleo!

La kleigejo “Haus Sonnenberg” en St. Andreasberg. (Rudolf Fischer. *Sunmontaj gvidlinioj por Eŭropa lingvopolitiko // Esperanto aktuell*, 2010, №6, p. 9)

Laŭpeta malgajno

... venis la sube aperigata oficiala reago (perdonpeto) far GEJ. (Julia Hell. *Oficiala pardonpeto de GEJ // TEJO Tutmonde*, 2010, №3, p. 15)

Framo riproĉas al kadro ke ĝi plumpas

C-ano Koffi Gbeglo, kies simplaj demandoj jam nervozigis la UEA-komitatanon, ĝis tioma grado ke li estis forbarita de ties diskutlisto, same simplajn komencis fari al la estraroj de UEA kaj ILEI pri la Komuna Eŭropa Framo de Referenco, tie nomata (en plumpa traduko) “referenckadro”. (*Kial ili ne respondas trafe al Koffi Gbeglo?* // HeKo 470 3-A, 8 feb 2011, esperantio.net/index.php?id=1601)

Kaka agado

La celo de edukado.net lanĉi distancan trejnadon tute kongruis kun la tiudirektaj planoj de ILEI... (Reta instruista trejnadado ĉe Edukado.net, edukado.net/novajhoj?id=36, stato 17 feb 2011)

Estas, sed neniom

Estas do ligo inter Zamenhof kaj Litovio, eĉ ne unu! (Ŝilas V. *Zamenhof kaj Litovio // Litova Stelo*, 2010, №3, p. 14)

Praavo kaj la kotokukoj?

Koloro de okukoj (rubrikotitolo ĉe “Personaj detaloj” de edzperanto.orghttp://www.edzperanto.org/showprofile.php?id=118)

Ĉiujn ĉi-monatajn reduktaĵojn legis, rimarkis, rimarkigis kaj plusendis

Ionel Oneț



Esperantujo vokas

Lernu kaj ĝuu Esperanton en sunoplana sud-Kalifornio!



NASK

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

2 – 10 julio, 2011

ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego ➔UCSD

- ★ Instruistoj: Lee MILLER (USA), Birke DOCKHORN (Germanujo) kaj Bertilo WENNERGREN (Svedujo)
- ★ bela marborda etoso ĉe mondfama universitato
- ★ intensa lernado de Esperanto je tri niveloj
- ★ instruistoj kaj lernantoj el la tuta mondo
- ★ riĉaj eksterkursaj programoj: ludoj, ekskursoj, muziko...
- ★ komforta, propra dormoĉambro kaj tri manĝoj tage

Stipendioj haveblas!

Por pli da informo, vidu: <http://esperanto.org/nask>
Aŭ kontaktu kunordiganton Ellen EDDY, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, USA
(360) 754-4563 • EddyEllen@aol.com

“La Ondo” rekomendas veni al San Diego.

SES 2011

Somera Esperanto-Studado

30.07.-07.08.2011, Nitra, Slovakio

Kvara renkontiĝo de *lernu!* uzantoj

Kio atendas vin?:

elstaraj instruistoj, agrabla loko, bonega etoso, ekskursoj, sportumado, naĝado, koncertoj, prelegoj, diskutoj, filmoj, vin-gustumado...

Specialaj ĉi-fojaj programoj:

ILEI+E@I seminario „Flugiloj de malfacila vento“
Konkursoj kun valoraj premioj

Pli da informoj: www.lernu.net/ses aŭ ses@lernu.net



“La Ondo” rekomendas veni al Nitra.




Ĉinio. Trideko da esperantistoj el Ĉinio kaj Vjetnamio, lernis dum unu monato (escepte de la tagoj de la Printempa Festo) en la 2a Vintra Esperanto-Kursaro en Kantono (vd. p. 7) sub la gvido de Dennis Keefe (Usono), laŭ liaj BEK-lernolibroj, kiujn en la supra foto tenas la entuziasmaj kursanoj. (*Gong Xiaofeng*)



Pollando. Tri hungarinoj, loĝantaj eksterlande (de maldekstre: Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Zsófia Kóródy), ĉi-vintre akceptis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (vd. p. 5) finekzamenojn, interalie, de Christophe Chazarein el Francio. (*La foton sendis Zsófia Kóródy*)




Serbio. Ĉar en Serbio kaj Turkio estas malmultaj kvalifikitaj instruistoj de Esperanto, en januaro Beograda Esperanto-Societo organizis enkondukan seminarion por estontaj Cseh-instruistoj. La konata Cseh-instruistino Tereza Kapista gvidis la seminarion por sep serboj kaj tri turkoj. (*Dimitrije Janičić*)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*
Serio *Scio*, Volumo 9
64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*
Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6
168 paĝoj, 15 eŭroj



Dek libroj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1
32 paĝoj, 4,50 eŭroj



Dek gazetoj / Kompilis Aleksander Korĵenkov
Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2
32 paĝoj, 4,50 eŭroj